

DE IL POPOLA CINIO

中國報道

8 1987





Patrino kun sia filo

Foto de LIŪ SIGONG

Enhavo

Saĝoŭ en prospero	2
Grava ŝanĝiĝo en produktado de la ĉina malpeza industrio	5
La prospera plastia kirurgio de Ĉinio	15
En la regno de migrantaj birdoj	8
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (8): En arbara zono ĉe la supra Jangzi-rivero	55
JUBILEA JARO DE ESPERANTO: Rememoro kaj deziro	25
Por Krei Pacan Belan Mondon (Kanto)	32
Miaj vojaĝimpresoj pri Ĉinio	28
ESP-NOVAĴOJ	34
POR KOMENCANTOJ: Sovaĝansero kaj rano; Parenĉiĝo kun potenculo	62
Trezora porcelanaĵo el Ĝjun-bakujo	49
ĈINAJ ARTOJ: Jadaĵ skulptaĵoj	18
NOVELO: Kanto-stelulo migranta inter kafejoj (Unua parto)	37
ĈINA LITERATURO:	
Sep personuloj de Ĝjan'an-erao kaj sep bambuaraj famuloj	40
El la verkoj de sep personuloj de Ĝjian'an-erao kaj sep bambuaraj famuloj	43
Dimaĉe	66
TRA NIA LENSŬ: Ĉarmaj ornamaĵoj (Kolora bildoserio)	45
Medio kaj materialigo de forĵetaĵoj	53
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La maroj de Ĉinio	51
POR VIA SANO: Masaĝo (I)	68
AMUZO	65
KURANTAJ AFEROJ.	63
KORESPONDI DEZIRAS	14
SUR LA KOVRILO: Junulino de Va-nacieco	Pentraĵo de ĜOŬ ŜIUĈING
INTERNE DE LA KOVRILO: Patrino kun sia filo	Foto de LIŬ SIGONG
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: ĈINAJ POŝTMARKOJ	
SUR LA DORSKOVRILO: Pejzaĝo de Tjanzi-monto en Hunan-provinco	Foto de ĜANG JUNLEJ

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugaliao	Eŝc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50					

ŜAGŬ EN PROSPERO

En la 30-aj jaroj de la 20-a jc. sur la ebenan sabloriĉan lokon sude de la malsupra Jangzi-rivero, ĉe Tajhu-lago transloĝiĝis mizeraj fiŝistoj de norde de Jangzi-rivero, kun deziro turni la sterilan lokon en "oazon".

Pasis multaj jaroj, sed ilia "oazo" ankoraŭ ne estis videbla.

En la 60-aj jaroj oni oficiale starigis tie gubernion Ŝagoŭ, kun 760 000 loĝantoj. La totala produktovaloro de ĝiaj industrio kaj agrikulturo estis malpli ol cent milionoj da jŭanoj, el kiuj la industria produktovaloro estis 38 milionoj da jŭanoj. Per sia diligenta laboro

la kamparanoj ĉiujare enspezis po nur 61.4 jŭanojn. 80% de la kamparanoj loĝis en kabanoj.

En la 70-aj jaroj la stato ankoraŭ ne pliboniĝis. En 1977 la kamparanoj enspezis po malpli ol cent jŭanojn jare.

Tamen, en la 80-aj jaroj la tiea ekonomio grandpaŝe progresis kaj la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo kreskas meznombre je 27.28% ĉiujare. En 1986 ĝi atingis 4 358.65 milionojn da jŭanoj. La tieaj kamparanoj enspezis po 800 jŭanojn jare, kaj duono de la kamparanoj havas novan domon, kaj vilao-similaj dometoj videblas ĉie.

Kamparana ĝardeno de la urbeto Ĝinjeng en konstruado



Komence de 1987 mi vizitis tiun gubernion. Ĉe mia elbusiĝo, mi konfuziĝis: la nomo de la haltejo ne estas Ŝaĝoŭ! Ĝuste tiam iu pasanto diris al mi, ke la gubernio ricevis la novan nomon Ĝangĝjagang-urbo antaŭ tri monatoj.

PROSPERAJ VILAĜAJ KAJ URBETAJ ENTREPRENOJ

Kiel la malriĉa Ŝaĝoŭ fariĝis riĉa urbo? La lokanoj unuvoĉe diris, ke oni ŝuldas tion al la vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj.

La vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj estas funkciigataj de la lokaj superflujaj laborfortoj kaj investitaj per kapitalo de la kamparanoj mem. Tio estas rekta rezulto de la ekonomia reformo praktikata de la fino de la 70-aj jaroj en la kamparoj de Ĉinio.

La tieaj vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj aperis en la sama tempo kaj grandpaŝe disvolviĝas en la 80-aj jaroj. Nun ili jam fariĝis grava apogilo de la urba ekonomio. - Nun 76% de la produkto-valoru de Ĝangĝjagang estas kreita de tiaj entreprenoj.

La vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj de la urbo ĉefe estas malpez-industriaj kaj tekstilaj. Tie estas ankaŭ metalurgia, kemia kaj elektronika fabrikoj. La nombro de la specoj de iliaj produktaĵoj jam superis 3 000, el kiuj nemalmultaj estas bonkvalitaj en la sfero ŝtata kaj provinca, iuj vendiĝas eksterlande. Ni prenu jenajn ciferojn kaj faktojn kiel ekzemplojn. La kvanto de la kaŭĉukaj biciklaj pedal-blokoj tie produktitaj konsistigas trionon de la totala produktokvanto de la lando. En la urbeto Ĝinfeng estas moderna vitra fabriko, kiu povas produkti 1 300 000 normajn kestojn da vitro ĉiujare. Ĝi estas la dua produkta bazo de Ĝjangsu-provinco tiufanke. La fabriko de medicinaj aparatoj en tiu urbeto provizas 500 hospitalojn tra la lando per siaj produktaĵoj. La urbeto produktas ankaŭ diversformajn ĉasistajn tranĉilojn, kiujn oni vendas en pli ol 50 landoj. La fabriko de komputilaj memoriloj de la urbeto Tangĉjaŭ produktas porbankajn komputilojn, kiuj povas elkalkuli en momento la totalan sumon de interezo laŭ deponita monsumo, depon-periodo kaj intereza tarifo. La produktaĵoj estas bonvenaj al enlandaj bankistoj. Por lanĉo de la unua ĉina sinkrona satelito estis uzataj komputilaj memoriloj de tiu ĉi fabriko.

Mi vizitis faman riĉan vilaĝon Oŭĉjaŭ apud la urbeto Tangĉjaŭ. La vilaĝo havas ok fabrikojn,



En vilaĝa fabriko de koltukoj de Ŝaĝoŭ

el kiuj lan-tekstila fabriko produktas pseŭdolanan teksaĵon kaj long- kaj mezlongfibran teksaĵon, kiuj havas grandan debiton en multaj grandaj urboj. La vilaĝo funkciigas hotelon, restoracion, teatron, librejon kaj plast-plankan pilkludejon. Tie okazis la Oŭĉjaŭ-pokala tutlanda korbopilka invitturniro, partoprenita de pluraj fortaj teamoj. En la vilaĝo funkcias telefonista centralo kun cent telefonoj. La geknaboj senpage lernas en elementa lernejo kaj mezlernejo. La kamparanoj ĝuas senpagan kurac-servon. Ekde 1986 la vilaĝo emeritiĝas kaj pensiigas la virojn pli-ol-60-jarajn kaj virinojn pli-ol-50-jarajn.

En luksa vilaĝa oficejo iu oficisto emocie diris al mi: "Antaŭ dek jaroj la tieaj kamparanoj loĝis en kabanjoj. Ili devis kolekti monon kaj aĉeti kerosenon por lumigi lampon en eventuala vilaĝa kunveno, por ne paroli pri elektra lampo kaj telefono."

VILAĜAJ KAJ URBETAJ ENTREPRENOJ KAJ AGRIKULTURO

En Ĝangĝjagang estas 175 000 kamparanoj, t.e., 40% de la tieaj laborfortoj, sin okupas pri industria produktado, sed en Sigang kaj Tangĉjaŭ tiaj kamparanoj konsistigas 70% kaj 90% respektive. Ĉu tio ne malhelpis la agrikulturon?

Statistiko montris, ke en la lastaj jaroj tio ne nur ne malhelpis la disvolviĝon de agrikulturo, sed kontraŭe, akcelis stabilan kaj altan agrikulturan produktadon. La totala grena produktokvanto en la lastaj 7 jaroj pliiĝis je 10% kompare kun tiu en la antaŭaj sep jaroj. Tiu de kotono je 18%. Tiu de oledonaj plantoj je pli ol 50%. La kaŭzo estas, ke post la reformo de agrikultura administra sistemo multe altiĝis la produkta aktiveco de la kamparanoj, kaj ke la vilaĝaj kaj

urbetaj entreprenoj multe favoras al la agrikultura disvolviĝo.

La vilaĝo Oŭĉjaŭ elspezas ĉiujare parton de siaj profitoj de la industriaj entreprenoj por aĉeti agrikulturajn maŝinojn kaj fari servojn al la agrikultura produktado. Nun ĝi havas 134 maŝinojn, kiaj traktoro, kombajno, rizid-priklilo, kanalfosilo kaj sem-maŝino. 80% de fizikaj laboroj estas farataj de maŝinoj. Krome, la vilaĝo donas ankaŭ adekvatan subvencion al kamparanoj laŭ ties kultivata tero por kuraĝigi ilin bone fari sian terkulturon. Vilaĝa kadro diris: "Ni praktikas politikon de komuna riĉiĝo kaj inter la enspezo de terkulturantoj kaj fabrikaj laborantoj ne ekzistas granda diferenco."

La prospero de la vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj rapidigas la konstruadon de malgrandaj urbetoj en la kamparo. En la lastaj kvin jaroj en la urbetoj de Ĝangĝjagang estis konstruitaj fabrikoj, butikoj kaj urbaj instalaĵoj kun areo de miliono da kvadrataj metroj. La totala investo atingis sume 150 milionojn da jŭanoj. La monsumo venis de la interezoj de la vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj. En la urbeto Tangĉjaŭ estas sufiĉe bona betona strato, funkcias ĉiovendejo, restoracio, teatro, hospitalo kaj eduka centro por plenaĝuloj, staras kultura domo. La domoj viciĝas unuj apud aliaj. La urbanoj estas provizitaj per kranakvo.

La urbeto Ĝinfeng kolektis 500 000 jŭanojn kaj fondis per la mono "kamparanan ĝardenon", ripozejon por la kamparanoj. La 1-a de septembro estas festotago de la tieaj maljunuloj. Ĉiujare en tiu tago la registaro de la urbeto regala la maljunulojn per longvivsimbolaj vermiĉeloj kaj invitas ilin promeni en la "kamparana ĝardeno".

INTELIGENTAJ KAMPARANOJ

La administrantoj de tiuj entreprenoj estas kamparanoj ne multe klerigitaj. Tamen ili estas talentaj en administrado de modernaj fabrikoj. La fabrikdomoj estas vastaj, elegantaj kaj helaj, iliaj kortoj estas ĝardeneskaj, la produkta administrado kaj entreprenado pli evidente montras la talenton kaj saĝon de la kamparanoj.

En la urbeto Ŝjiĝang mi vidis kamparano-entrepreniston Ŝji Ŝipin, la estron de la Ĝenje-a Ĝenerala Kaŭĉuka Fabriko en Ŝaĝoŭ. Li estas ne multe klerigita, sed bone administras la fabrikon.

Antaŭ kelkaj jaroj oni alvokis atenti trejnadon de infanaj piedpilkistoj. Li cerbumadis: En sia infaneco fama brazila piedpilkisto Pele prenis ŝtrumpeton remburitan per ĉifonoj kiel piedpilkon. Kian pilkon nun ludas infanoj de Brazilo? Kaj kian pilkon ludas ĉinaj infanoj? Li tuj demandis per letero al koncerna institucio, ĉu en kaj eksterlande oni produktas norman piedpilkon por infanoj. Li ricevis nean respondon. Kaj tiel venis al li en la kapon kuraĝa ideo.

En aŭgusto de 1983 okazis en Suĝoŭ la Unua Pepe-pokala Tutlanda Piedpilka Konkurso financita de la Ĝenje-a Ĝenerala Kaŭĉuka Fabriko. Poste la fabriko okazigas ĉiujare tutlandan infanan piedpilkon konkurson kaj tiel vendiĝas tra la lando Pepe-pilkoj produktitaj de ĝi.

Malfermiĝis la enlanda merkato de la pilko. Ŝji Ŝipin turnis sian atenton al la eksterlanda merkato. La fabriko fincos la Internacian Pepe-pokalan Piedpilkon Konkurson okazigotan, aŭguste de 1987. Sendube tio donos favorajn kondiĉojn por vendi Pepe-pilkon en la internacia merkato.

En la urbeto Tangĉjaŭ estas du junaj kamparanoj, honoritaj per la titolo "kamparano-inĝeniero". Ili lernis nur en mezlernejoj. Sed post diligenta memlernado ili projektis komputilajn memorilojn por lanĉi sateliton.

NOVA HAVEN-URBO

Promenante sur strato de Ĝangĝjagang mi subite sentis iafoje, ke la urbo kvazaŭ aperis en unu nokto. La novaj ĉ. 20-etaĝa Ĝangĝjagang-hotelo, promenejoj kaj markoj de aŭtobusaj haltejoj kaj prosperaj vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj transformis la postiĝintan gubernion en novan urbon en rudimenta formo.

Ĝangĝjagang, kiel porkontenera haveno, havas jaran ŝarĝ-malŝarĝan kvanton de 3.4 milionoj da tunoj. Sur la 5.5-kilometra marbordo de la haveno nun streĉe konstruiĝas 26 dekmil-tunelaj ankrejoj. Post la finkonstruiĝo la jara ŝarĝ-malŝarĝa kvanto atingos 30 milionojn da tunoj. Kun la disvolviĝo de konstruado de la haveno la kvanto de eksportaĵoj de la vilaĝaj kaj urbetaj entreprenoj kreskos rimarkinde. Disvolviĝos ankaŭ la terciara industrio, kultura kaj eduka afero, proporcie al la haven-urba konstruado. Unuvorte, la urbo Ĝangĝjagang pli prosperos. Ĝia perspektivo estos multe pli brila ol tiu de "oazo" ravita de la antaŭaj fiŝistoj. □

Grava ŝanĝiĝo en produktado de la ĉina malpeza industrio

Kiam ankoraŭ flirtis neĝflokaj, sed sur la ekrano de televidilo jam aperis reklamoj pri elektraj ventumiloj faritaj de pluraj fabrikoj. La fabrikoj anticipis reklamis siajn ventumilojn per kontraŭsezona efekto por doni pli fortan eksciton al la bezonantoj.

Nun multaj fabrikoj konkure reklamas per diversaj kanaloj siajn televidilojn, magnetofonojn, lavmaŝinojn k.s. de tiaj kaj aliaj tipoj kaj markoj por pligrandigi sian vendadon en konkurenco.


Tio montris, ke iuj produktoj de la malpeza industrio de Ĉinio nun havas sian "merkaton de aĉetantoj" kaj la konsumantoj

fariĝis mastroj de la merkato. Oni ne ŝatas surplankajn elektrajn ventumilojn, ĉar ili okupas vane spacon vintre. La konkurantaj fabrikoj do produktas ventumilojn kun funkcio de vest-hokoj. Aliaj malkontentas pri la malplaĉa fumo en la kuirejo, oni do produktas malpli kostajn ventolilojn. La bezono de la uzantoj jam fariĝis kriterio por altigi la kvaliton de produktaĵoj kaj ilin renovigi.

La konkurenco en merkatoj estas grava ŝanĝiĝo en la disvolviĝo de la konsumaj-produktado de Ĉinio. En nia lando la entreprenoj de la malpeza industrio la unuaj efektivigis la transiron de nura produktado al varpro-

duktado, t.e., transiron de la produktado dependa sole de la planoj al tiu konforma al la merkata bezono, transiron de atento pri produktovaloro al tiu pri la var-specoj kaj kvalito. Nun ĉiuj magazenoj de Ĉinio estas abundaj je varoj de malpeza industrio. Ĉiujare oni projektas pli ol 5 000 specojn de varoj, kies du trionoj komencas produktiĝi en la sama jaro. La nombro de la specoj de malpez-industriaj produktoj kreskis de pli ol 30 000 en 1978 al 60 000 en 1987. Oni konjektas, ke la varoj, kiaj dusitela lavmaŝino, duporda fridujo, kiuj nun havas grandan debiton, certe iros al "merkato de aĉetantoj" post kelkaj jaroj.

En la Suĝoŭ-a Fabriko de Fridujoj



LA ĈINA MALPEZA INDUSTRIO EN REFORMADO

Post eksperimentado de kelkaj jaroj la Ministerio de Malpeza Industrio de Ĉinio forlasis la malnovan produktan administradon kaj donis sian atenton al esplorado pri la leĝoj de la socialisma planizita varekonomio kaj por trovi la vojojn por disvolvi la novan ekonomion.

Respondeculc de la Departemento pri Plano sub la ministerio tiel priskribis la altan centraliziĝon de la pasinta planizita administrado kaj ĝian kontraŭstaron al la merkato kaj varieco de produktoj: "Antaŭe, la produkta plano ĉiam ludis gvidan

rolon. Ĉiuj produktoj, kiujn enprenis en sin la plano, estas garantiataj ne nur en provizo de krudaj materialoj, sed ankaŭ en vendo. Tial malsamaj departementoj kaj landpartoj ĉiamaniere klopodis por enlistigi siajn produktojn en la planon. Rezulte de tio, la produktoj fabrikitaj laŭ la ŝtata plano plimultiĝis kun jaro, la plano mem ĉiam pli komplikiĝis kaj ĉiam pli serioze disiĝis de la realo. Efektive, nur centoj el la dekmiloj da specoj de malpez-industriaj produktoj estis listigitaj en la planon. Tiuj varoj, kiuj ne estis listigitaj en la planojn, ne povis akiri krudajn materialojn, nek povis vendiĝi. La fabrikoj do devis fari ĉion per si mem. Ifoje okazis, ke iuj varoj ne estis fabrikitaj. Tial multaj varoj ne videblis en la merkato. Kiam terure mankis ĉiutagaj bezonaĵoj, oni devis alpreni provizorajn urĝajn rimedojn.”


La plurjara reformado multe ŝanĝis la malpezan industrion de Ĉinio en la planizita administrado, cirkulado, investado kaj administrado interne de la entreprenoj, kio akcelis multe ĝian disvolviĝon en la lando.

Nun, la malpez-industriaj produktoj fabrikitaj laŭ plano en Ĉinio reduktiĝis de 117 specoj en 1978 al 80 en 1986, dum la aliaj produktoj estas fabrikitaj laŭ la gvida plano kaj la merkata reguligo. La Ministerio de Malpeza Industrio rajtigis la lokajn entreprenojn ĝustatempe reordigi la strukturon de produktoj kaj aranĝi produktadon laŭ la ŝanĝiĝoj en merkato. Kaj nun la entreprenoj povas mem aranĝi sian produktadon kaj fari konvenan reordigon laŭ la merkato prezentinte sian produktan planon al la supera instanco por registrado. Kaj koncerne la ordonan planon, la entreprenoj

povas ankaŭ aranĝi fabrikadon de aliaj produktoj, kondiĉe ke ili plenumis la planon difinitan de la ŝtato.

Dank' al la reguligo de la merkato, nun la produktado de malpeza industrio ne plu gvidas la vendadon, sed male, oni decidas la produkton laŭ la bezono. Radikale ŝanĝiĝis ankaŭ la rilatoj inter produktado kaj konsumado. Senĉese aperas novaj entreprenoj kaj produktoj, rapide plimultiĝas facile vendataj varoj, la produktokvanto de bonkvalitaj varoj pli kaj pli grandiĝas en unuiĝo de entreprenoj kaj rapide disvolviĝas ankaŭ longe uzataj kaj altklasaj ĉiutagaj bezonaĵoj. Kelk-, kelkdek- aŭ centoble pligrandiĝis la kvanto de multspecaj malpez-industriaj produktoj. La produktado de plastaĵoj, porfamiliaj elektraĵoj, sinteza lesivo, aromaĵoj, esencoj, enzimaj preparaĵoj,

Produktolinio de televidiloj de la Kvara Radio-fabriko de Sanhajo



pormanĝajaj gelatenoj k.a. estis malforta en 1978, sed nun fariĝis pli granda.

Por ke la entreprenoj pluapŝe vigliĝu, kiel faka ekonomia organizo, la Ministerio de Malpeza Industrio rapidigis siajn paŝojn por ŝanĝi sian funkcion, faras vastan enketon pri la merkato kaj esploras pri la variigo de psiko kaj kutimo de konsumantoj, strukturo kaj tendenco de konsumado por pli bone servi al la malpeza industrio de la tuta Ĉinio.

Por protekti la interesojn de la konsumantoj, respondeculo de la ministerio deklaris, ke oni preferas redukti produktokvanton ol malaltigi kvaliton. Tiu-cele ĝi alprenis devigajn rimedojn: La entrepreno devas organizi la produktadon laŭ internacia normo; 40% de la monpremio devas esti tiu de kvalito. Kaj en la tuta lando estas starigitaj 84 stacioj por ekzameni la kvaliton.

Kiel tenanto de la makra situacio, la ministerio, en la investo de la fiksa kapitalo, donas apartan atenton al la longdaŭre varia tendenco en la merkato. Ekzemple, en la ĉina merkato longe daŭris la granda debito de piano, tial oni investis grandan sumon al la kvar grandaj pianfabrikoj en Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj Jingkoŭ, por ke ili produktu bonkvalitajn pianojn. La entreprenoj, subtenataj teknike kaj ekipaĵe, estas senescepte produktantoj de ledoj, peltoj, vestoj, mebloj, biero, ceramikaĵoj kaj aliaj debithavaj varoj.

La malstreĉiĝo de la sistemo vigligas la disvolviĝon de la entrepreno. Sed post kiam aperis la merkata ekonomio, kiel akiri informon kaj kiel organizi produktadon laŭ merkata postulo



La Kompanio de Porfamiliaj Elektraĵoj de Ĝanĝiang produktas elektrajn kuirmarmitojn, kiuj havas grandan debiton en- kaj eksterlande.

fariĝis ŝlosila problemo por ĉiuj entreprenoj.

LA INFLUO DE MERKATO SUR LA ENTREPRENOJ

Nun la malpez-industriaj entreprenoj tre priatentas merkatajn informojn, ĉar tio kelkiam povas malfermi novan merkaton al la entrepreno kaj portos al ĝi profiton. Laŭ informo pri la bezono de la konsumantoj la principo, strukturo, funkcio, tekniko, trajto kaj uzoj de la produktaj ĉiuj povas esti plibonigitaj, kaj tio ebligas al la entrepreno okupi la merkaton. La merkata konkurenco iom post iom plifortigas la konscion de la entrepreno pri neceso de renovigo de la produktoj. En la pasinta ĉina merkato la brakhorloĝoj havis nur unu formon dum dekelkaj jaroj, la bicikloj ne estis kolore lakitaj kaj la vinboteloj restis forme senŝanĝaj. La fenomenon ne povas toleri la merkato, kiam senĉese disvolviĝas la produktaj fortoj, la liverado de iuj malnovaj produktoj superis la bezonon kaj la populara konsumado tendencas al varieco kaj aparteco. Tiaokaze al la malpeza industrio restas nenio alia ol rapidigi sian reordigon. Stimulate de la mer-

kataj informoj, la ĉina malpeza industrio produktis meznombre 10 novajn specojn ĉiutage en 1986. Pli ol 20% de la ekzistantaj specoj estas renovigitaj.

Senĉese ŝanĝiĝas la stato en la merkato. Nun iuj entreprenoj, kiuj produktas varojn debithavajn, sin trovas en "merkato de vendantoj", sed tuj post kiam ili perdos sian superecon, ili falos en intensan merkatan konkurencon. Tia ŝanĝiĝo estas senkompata. En Tjanĝin ĉ. 20% de la malpez-industriaj entreprenoj povas produkti novajn specojn, tuj post kiam iliaj ĉefaj varoj perdas la merkaton, tamen plejparto de la entreprenoj ankoraŭ ne havas tian kapablon.

La entreprenoj bezonas grandan merkaton. Respondeculoj de iuj malpez-industriaj entreprenoj diris al nia raportisto sian deziron pri la ideala merkato, maro de la varekonomio, kiu povas vigligi la kapablajn entreprenojn kaj dronigi tiujn senkapablajn. Laŭ la procezo de la reformado de la ekonomia strukturo estas antaŭvideble, ke la malpez-industriaj entreprenoj de Ĉinio havos ankoraŭ pli vastan merkaton kaj pli prosperos ilia produktado. □

En la regno de migrantaj birdoj

Ĉe la horizonto, kie kunfandiĝas la ĉielo kaj la akvo, miloj da grupoj kaj aliaj birdoj senĝene moviĝas sur la lago kaj herbejo kun longo de 2-3 kilometroj, kvazaŭ neĝo kovrus la lokon. Tiuj raraj birdoj, karesate de la milda suno, serĉas nutraĵojn, amuzas unu alian, promenas, aŭ kombas al si la plumaron. Intertempe aŭdiĝas bruado.

La grandiozan spektaklon mi vidis pere de sesdek-obliga teleskopo en la rezervejo de migrantaj birdoj en Pojang-lago de Ĝjangŝji-provinco.

UĈENG, LA ĈEFURBO DE LA REGNO

Pojang estas la plej granda dolĉakva lago de Ĉinio. Ĝi situas sude de Jangzi-rivero,

Ĝjangŝji-provinco. La areo de la lago varias inter 3 900 kaj 5 000 kvadrataj kilometroj en la sezonoj seka kaj pluva respektive.

Tie la klimato estas milda, pluvo abunda kaj senprujna tempo longa. Dank' al la naturdotitaj kondiĉoj, en la lago vivas pli ol 90 specoj da fiŝoj, kaj ĉiujare oni kaptas el la lago 25 000 tunojn da fiŝoj. Cetere en la lago vivas diversaj moluskoj, salikoj, kraboj, birdoj, lotusoj, herboj k.a. En la komenco de novembro de norde alflugas al la lago diversaj birdoj por travintri. Ilia gastado faras la lagon konata kiel regno de migrantaj birdoj.

La administracio de la rezervejo situas en la urbeto Uĉeng,

okcidente de la lago. Oni nomas ĝin la ĉefurbo de la regno de migrantaj birdoj.

La rezervejo el 9 lagoj kovras 224 kvadratajn kilometrojn. La urbeto sidas centre de la rezervejo. Nun estas tie konstruataj observejo, protektejo, gvatturo kaj gruobredejo. Post nelonge la loko estos internacia centro por esplori grupojn.

MONDO DE GRUOJ

Juna Ĝong, gardisto de la lago, helpis min kiel vojqvidisto. Li bone scias la lagojn kaj iliajn birdojn. Li kondukis min al kelkaj observejoj, sed mi vidis nur malmultajn grupojn, cikoniojn, sovaĝanserojn, kaj ne grandan grupon da birdoj.

“La migrantaj birdoj ŝatas amasloĝi apud la bordo en malvarmaj tagoj. Hodiaŭ la suno varme brilas, sur la lago ne ventas, kaj la birdoj sur ĝi serĉas nutraĵojn.” Ĝong diris kun pli da certeco kaj kondukis min al la lago.

Li ĝoje ekkriis apenaŭ stariĝinte la teleskopon. “Rigardu!” Kaj mi tuj rigardis en la teleskopon turnante ĝin. Kadre de la sektoro de 120 gradoj mi vidis la spektaklon menciitan en la komenco de tiu ĉi artikolo. Mi longe observis kaj trovis, ke la nombro de la birdoj estas 3 000-4 000.

Ardeoj serĉas nutraĵon en malprofunda lago.





Gruoj sur Pojang-lago




Esplorantoj de la Internacia Birda Fonduso de 1985 ĉe Pojang-lago

Foto de JOŬ JUNGU




Gruoj en mateno



Blankaj gruoj sur Pojang-lago





Cignoj kaj sovaĝanseroj



Blankkolaj grupoj

Ĝong diris al mi, ke la migrantaj birdoj ĉi tie travintranĵaj amasiĝas ĉefe ĉe la nordokcidentaj lagoj. Tiuj lagoj ŝirmantaj de la nordokcidenta vento estas belaj kaj karesataj de la suno, kun abundo da akvoherboj. Ĉiujare en aŭtuno kaj vintro, kiam la akvo en la lagoj retiriĝas, nudiĝas la vastaj strandoj plenaj de herboj. Krome, la fundo de la lagoj estas ebena, akva temperaturo modera, en la lagoj vivas abundaj fiŝoj, salikokoj, litorinoj, mituloj, kreskas lotusoj, trupoj, sagitarioj, sovaĝapioj k.a., kiuj liveras al la birdoj bonajn nutraĵojn. Cetere, la loko estas malofte vizitata, kaj sekve ĝi estas paradizo de migrantaj birdoj.

Laŭ la unuapaŝa statistiko farita de la rezervejo, nun en Pojang-lago vivas 200 000 birdoj kun pli ol 160 specoj, inter kiuj troviĝas dekkelkaj specoj da raraj birdoj en la mondo, 69 specoj da akvobirdoj, kiaj gruo, cikonio, cigno, sovaĝansero, granda otido, mandarena anaso, ardeo, tringo, pelikano kaj sovaĝanaso.

En 1983, kolektinte statistikojn de diversaj landoj, la Internacia Simpozio pri Gruo anoncis, ke en la mondo ekzistas nur iom pli ol 200 gruoj. En 1984 la nombro anoncita estis 320. Tamen la raporto de Ĝjangŝj-provinco asertis en 1983, ke vivas 840 gruoj ĉe Pojang-lago, kaj en 1985 la nombro estis 1532. Evidente, la statistiko farita de la Internacia Simpozio pri Gruo ne enkalkulis la nombron de gruoj en Ĉinio. Januare de 1985, prezidanto de la Internacia Grua Fonduso venis al Uĉeng kaj persone nombris 1 350 gruojn. Li diris al ĉinaj kolegoj: "Vi trovis la plej valoran regnon de gruoj."



Ornitologoj esploras nutraĵon de birdoj.

INTERESAĴOJ PRI GRUOJ

La migrantaj birdoj venas al Pojang-lago por travintri tie laŭ sia propra kutimo. Ili elektas por si pasloĝejon laŭ ventodirekto, temperaturo, akva profundo ktp. Observado montris, ke en la lago Dahuĉi vivas plej multe da gruoj, kies nombro estas 4 000-5 000. En la lago Ĝonghuĉi estas plej multe da malgrandaj cignoj kun nombro de pli ol 5 000. Tie kuŝas reala cigna lago. Kaj en la lago Ĉanghuĉi vivas cignoj kaj blankkapaj anseroj. La lagoj Ŝjanghu kaj Banghu estas lokoj de paca kunekzistado por birdoj. Tie vivas cignoj, gruoj, cikonioj, sovaĝanseroj, mandarenaj anasoj, sovaĝanasoj k.a., kun nombro de ĉ. 500 000. Sur la insuleto Dabaŭ mastras ekskluzive otidoj.

Ie apud klara akvo mi vidis kelkajn malgrandajn familiojn de birdoj. Tie estis familio el tri membroj intimaj, kaj tie ĉi estis solulo. Ili enigis sian kapon en la akvon por serĉi nutraĵon, kun alte tenata vosto. La familio estis de gruoj, kaj la solulo cikonio.

La blanka cikonio ŝatas solecan vivon kaj malofte aktivus multope.

La blanka gruo, kun longaj kolo, rekta beko kaj piedoj kaj neĝblanka plumaro, sin tenas nobele. Ĝi estas pli rara ol la ruĝverta gruo kaj difinita de la Internacia Naturprotektata Organizo kiel la unuaklasa protektata birdo proksimiĝanta al la pereco.

Ĝenerale, la grua familio konsistas el tri membroj. La blanka gruo fekundiĝas en aprilo kaj majo en Siberio. Ĉiujare la blanka gruo demetas nur du ovojn. Elkoviĝinte, la du gruido pikiĝas unu la alian, ĝis unu el ili mortos. Laŭdire, oni neniam trovis kvarmembran familion de gruo. Eble en tio kuŝas la kaŭzo, ke estas malgranda la nombro de gruoj kaj ili malrapide generadas.

La blanka gruo estas tre singardema. Ĝi neniam prenas venenan manĝaĵon. Se ĝi flaras manĝaĵon kun malplaĉaodoro en iu loko, ĝi do ne serĉos manĝaĵon en la loko por pli ol unu monato. La blanka gruo ŝatas vadi en malprofunda akvo kaj

dormas kun korpo sur unu kruro.

Oni iam kaŝis sin en herbaro por observi la luktadon inter grujaj familioj. Foje "kverelis" kvar grupoj el du grupoj. La "kverelantoj" etendis la kolon, laŭte kriis kaj paŝon post paŝo sin puŝis unu al alia, dum la aliaj grupoj staris apude kaj cedis al ili la lokon. Apenaŭ la du "kverelantoj" trupoj estis interluktontaj, ambaŭ flankoj subite retiriĝis, revenis al sia tereno kaj serĉis nutraĵojn.

Mi informiĝis, ke la gruo longas meznombre 1.3 metrojn kaj pezas 10 kilogramojn, kaj la vivdaŭro estas 70 jaroj. Pro siaj blanka plumaro, mildeco kaj emo al kantado kaj dancado ĝi estas rigardata kiel birdo simbollanta bonaŭguron kaj longvivecon.

SEKURA REGIONO DE MIGRANTAJ BIRDOJ

En la lastaj jaroj pli kaj pli multaj migrantaj birdoj venis

travintri en la lago. Antaŭe la birdoj forflugis tuj ĉe la homa alproksimiĝo. Sed nun ili ne timas homojn. La loko estas por ili sekura regiono.

La lago fariĝis regno de migrantaj birdoj pro tio, ke ĝi estas naturdotita per bonaj kondiĉoj, kaj cetere, la birdoj estas zorgeme protektataj en ĝi.

En la pasinteco lokanoj havis la kutimon vintre ĉasi sovaĝanaĵojn, cignojn k.a. Post la fondiĝo de la rezervejo oni pli kaj pli klare komprenis la signifon de tenado de la ekologia ekvilibro kaj protektado de la migrantaj birdoj. Multe pli maloftiĝis ĉasado, kaptado kaj venenado de birdoj ĉe la lago. Kiam la migrantaj birdoj flugas de norde suden, dekoj da oficistoj de la rezervejo ĉiutage rondiras ĉe la lago por protekti la birdojn. Kiam la birdoj ne povas akiri sufiĉan nutraĵon, ili do aĉetas por ili fiŝetojn kaj salikokojn.

KRESKANTA INTERESO PRI MIGRANTAJ BIRDOJ

Nun ekleviĝis la intereso rigardi migrantajn birdojn en kaj eksterlande. Antaŭvespere de la Kristnasko pasintjare, pli ol 400 fremdlandaj turistoj venis speciale al la gubernio Ŝingzi por rigardi migrantajn birdojn.

La observejo de Ljaŭnan-distrikto de la gubernio estas la unua birdobservejo de la rezervejo. La nova kiosko kaj observa turo impresas per pompa aspekto. La tieaj trafiko kaj pasloĝado estas facilaj. En la observejo mi vidis cignojn, sovaĝanserojn kaj grupojn.

Alia bona observejo estas Nanĝi-monto 60 km. for de Nanĉang, la ĉefurbo de la provinco. Krom diversaj migrantaj birdoj, oni povas vidi tie ankoraŭ pli raran nigrakolan gruan.

Rigardi migrantajn birdojn estas ja granda ĝuo. Mi esperas, ke pli da amikoj havos la feliĉon vidi la spektaklon ĉe la lago. □

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 21-j. fraŭlo dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Cui Yubin, Jiaoqu Shenji Ju, Tai-an, Shandong, Ĉinio.

* Shao Qinghai, Shizhi Bangongshi, Helanshan Nongmuĉang, Yinchuan, Ningxia, Ĉinio

deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj.

* S-ro Zhu En, Xichengxia 10-hao, Linhai Shi, Zhejiang, Ĉinio, dez. kor. kun ĉiulandaj gesamideanoj.

* L.S. Luo 26-j. dez. kor. kun gejunuloj kaj samhobiuloj el Hungario, Jugoslavio, Japanio, FR Germanio, Francio, Rumanio kaj Ameriko, pri fotado, filatelo, radio, lingvo-lernado kaj kolektas fotojn, bk, pm, foto-gazetojn, kino-gazetojn, E-gazetojn. Adr. Yunshuxiang 1, Neijiang, Sichuan, Ĉinio.

* 48-jara inĝeniero s-ro Liao Shicai, Huangpulu 23, Wuhan 430010, Ĉinio deziras interŝanĝi p.m. tutmonde.

* Szoke Loszlo (10-j. lernanto) dez. kor. pri naturo (herboj, birdoj), elektrotekniko kaj aliaj te-

moj. Tihadar 5/13, 4150 Odorheiu-Sec, Rumanio.

* 21-j. fraŭloj dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, speciale arto kaj monda literaturo, Esperante kaj angle. Adr.:

(1) Ali Reza Dowlatsnahi, P. B. 14875-143, Tehrano, Irano.

(2) Hooman Abbaspour, P. B. 13785-119, Tehrano, Irano.

* Anoj de E-rondeto diversaj, serĉas gekorespondantojn pri diversaj temoj, pri muziko senioza, fotoarto, turismo, vivkondiĉoj, pm., bk, ktp. Respondo garantiata. Esperanto-Rondeto ĉe S.K.P., Na Ostrove 54, 580 01 Havličkuv Brod, Ĉeĥoslovakio.

* 14-jara komencantino dez. kor. kun ĉiuj gejunuloj. Adr. Tatar Tniko, Nyiregyhaza, Garibaldi u. 20. II/6, 4400, Hungario.

La prospera plastia kirurgio de Ĉinio

— Vizito al la Hospitalo de Plastia Kirurgio
sub la Ĉina Medicina Akademio

Estas okulfrapa la Hospitalo de Plastia Kirurgio sub la Ĉina Medicina Akademio ĉe la piedo de la Okcidenta Montaro en la antaŭurbo de Pekino. Malgraŭ longa distanco inter si kaj urbaj kvartaloj, la hospitalo estas frekventata de pacientoj. Ĝin vizitadas diverslandaj fakuloj. Tie ankaŭ okazis granda internacia simpozio.

Antaŭ nelonge mi venis al la hospitalo por intervjuo. Feliĉe, survoje mi renkontis la pli-ol-70-jaran profesoron Song Ĵuhuj, la direktoron kaj fondinton de la hospitalo. Li, altstatura kaj vigla, konigis al mi sian okupon.

Song estas la unua ĉina profe-

soro de plastia kirurgio. En la juneco li lernis ĉe profesoro Robert H. Ivy, la fondinto de la plastia kirurgio de Usono, kaj akiris doktorecon de la Pensilvania Universitato. Post kiam li revenis la patrolandon en 1948, li sin dediĉis al la plastia kirurgio de Ĉinio. Maje de 1983, kun la ĉina delegacio sub sia gvido, li ĉeestis la internacian simpozion pri la vizaĝo-plastia kirurgio okazinta en Los-Anĝeleso, Usono. En la simpozio li ricevis la Or-segilan Premion pro sia bela prelego "Reformado de ekstera orelo per unufoja operacio". Li estis unu el la tri mondfamaj plastiaj kirurgoj premiitaj siatempe.


Profesoro Song diris al mi, ke plastia kirurgio nun reprosperegis en Ĉinio. Jam en Ĝin-dinastio (265-420 p.K.) oni notis kuracadon de leporlipo kaj en la 50-aj jaroj de la 20-a jc. plastia kirurgio estis alte taksata kaj havis iagradan disvolviĝon. En 1957 oficiale fondiĝis la Hospitalo de Plastia Kirurgio de Ĉinio. Ĝi tamen ĉesis funkcii post 10 jaroj pro la ĥaosa ĉina politika situacio kaj denove ekfunkciis en 1979.


Tiam en la hospitalo laboris nur 20 fakuloj. Por kreskigi la nombron de la laborantoj profesoro Song persone kulturis esplorstudentojn, funkciigis flegistinan lernejon kaj gvidis progresigajn kursojn ekde 1980, kiuj trejnigis pli ol 200 medicinajn laborantojn de plastia kirurgio por la tuta lando. Tiel Ĉinio ekhavis fakajn plastiajn kirurgojn kun la hospitalo kiel sia kerno.

Interparolante, ni atingis la hospitalon. Antaŭ ni staras eleganta ĉin-stila konstruaĵo kun korto, kie ŝprucas fontano, prosperas ĝardeneto kaj ĉarmas kioskoj. Vere ideala loko por kuracado.

En akompano de la profesoro mi vizitis la hospitalon, kiu kovras 100 000 kvadratajn metrojn, kun 470 laborantoj. Antaŭe en la hospitalo estis nur 20 malsanulaj litoj, sed nun 300 litoj. En la nove starigita moderna opera-

Profesoro Song en laboro





Ekstera orelo antaŭ kaj post operacio

de diversaj handikapoj kaj misformiĝoj pro brulvundo, traŭmato, bakteria infekto aŭ operacio de diversaj tumoroj aŭ de denaskaj misformiĝoj kaj difektoj, kiaj difekto de orelo kaj nazo, leporlipo kaj palatofendo. Plastia kirurgio ja estas destinita por fari korekton, riparon kaj enplanton de la homaj histo kaj organo al tiuj malsanuloj por beligi ilian eksteran formon kaj renormaligi ilian fiziologian funkcion. Plastia kirurgio rilatas al ĉiuj kampoj de kirurgio. La fakuloj de plastia kirurgio devas ne nur bone koni medicinon kaj esti bone trejnitaj, sed ankaŭ havi sciojn muzikajn, belartajn kaj psikologiajn.

cia domo troviĝas 15 operaciejoj grandaj kaj malgrandaj. Sub la hospitalo laboras instituto de plastia kirurgio kun 8 esploraj sekcioj.

Kiam ni eniris fotografejon, fotisto estis fotanta kampanan knabinon, al kiu oni faris lipoplastion. Vidinte nin, ŝi estis iom ĝenata. La profesoro do diris al ŝi: "Ŝajne, via koro estas iom ombrata de malĝojo. Ne gravas. Mi rigardu vian operaciitan lipon. Ha, bone. Estos pli bone, se la lipo malŝveliĝos. Via patrino certe ĝojos, kiam ŝi vidos vin. Eble ŝi ne rekonos vin. Nu, ne ridu en tiuj ĉi tagoj."


Forlasinte la fotografejon, la profesoro diris al mi, ke la knabino suferis de denaska leporlipo. Ŝi ne estis operaciita antaŭe pro nescio. La homoj suferantaj de denaskaj organaj misformiĝoj estas tre ĉagrenitaj. Oni malestimas ilin kaj neniu volas edz(in)iĝi al ili. Nia operacio liberigas ilin de la ĉagreno kaj ebligas al ili sane kaj normale vivi kaj labori. Jen la devo de la plastiaj kirurgoj.

"Kion kuracas plastia kirurgio?" mi demandis la profesoron. Li respondis, ke multaj ofte implikiĝas en la distingo inter plastio kaj kosmetika operacio. Fakte la lasta estas nur malgranda parto de plastia kirurgio. Krom la homoj, kiuj volas akcepti kosmetikan operacion, vizitas la hospitalon ankaŭ aliaj patientoj, kiuj suferas aŭ

Oni diris al mi, ke en la pasintaj 7 jaroj la hospitalo multe progresis en kuracado, scienca esplorado kaj instruado de plastia kirurgio. "Reformado de organo per unufoja operacio" estas unu el ĝiaj elstaraj atingoj. Tuj post ĝia restariĝo estis miloj da patientoj, kiuj devis enhospitaliĝi por kuracado. Tion kaŭzis krom la grandnombreco de

La Hospitalo de Plastia Kirurgio de Ĉinio





Profesoro Song (meze) gvidas plastian operacion.

la pacientoj, ankaŭ plurfojaj enhospitaliĝoj kaj ripetadaj operacioj. Por mildigi la komplikaciojn kaj suferon de la malsanuloj en iliaj enhospitaligo kaj operacio, profesoro Song prezentis, post sia longa esplorado, la novan metodon "Reformado de organo per unufoja operacio". La metodo superis la organ-reformadon en pluraj stadioj kutime aplikatan eksterlande, ekz. en la pasinteco, por refari eksteran orelon, oni devis unue depreni ripon de paciento kaj poste fari oreformon, enplanti ĝin en lian kapon kaj fari haŭtan grefton kaj post ĉiufoja operacio la paciento devis ripozi unu monaton, kaj plie la artefarita orelo ne aŭdis. Per la nova metodo profesoro Song povas unufoje trui la akustikan meaton, grefti timpanan membranon kaj redoni al la malsanulo aŭdkapablon. Krome la hospitalo povas fari artajn nazon, penison, vaginon, mamon k.a. per unufoja operacio. Tiuj ĉi artefaritaj organoj en formo kaj funkcio

estas similaj al kaj eĉ pli bonaj ol la organoj faritaj per la kutima metodo.

En mikrokirurgio fakuloj de la hospitalo faris novan esploron pri libera klapo. Profesoro Song elpensis novan teorion pri muskol-septa haŭta klapo, tiel ke li trovis novajn liberajn klapojn, kiaj braka klapo kaj gamba klapo, bezonataj de plastia kirurgio.

Krome ili provis kombini la tradician ĉinan medicinon kun plastia kirurgio kaj atingis sukcesojn. La de ili faritaj ulcera oleo, unguento de angelika vakso kaj aliaj medikamentoj estas bonaj por ŝmiri la vundon kaŭzitan de haŭtotransplantado kaj infektitajn korpopartojn kaj efikaj por akceli epidermo-kreskon kaj resaniĝon.

En la pasintaj 7 jaroj profesoro Song 8-foje partoprenis internacian simpozion gvidante la ĉinan delegacion kaj faris prelegojn kaj esplorojn eksterlande, kio disvastigis la influon de la

ĉina plastia kirurgio en la mondo.

Maje de 1984 pli ol 400 personoj el diversaj mondpartoj, inkl. de multaj eminentaj plastiaj kirurgioj kaj profesoroj, ĉeestis en Pekino la senprecedence grandiozan internacian simpozion pri plastia kirurgio.

"Kiel statas plastia kirurgio en nia lando?" mi demandis la profesoron en lia oficejo.

Li diris: "Nun en Ŝanhajo, Ŝjian, Ŝenjang, Ĉengdu, Kanton, Nankino kaj aliaj grandaj urboj pluraj hospitaloj jam ekfaris plastiajn operaciojn. Ili scias bone fari preskaŭ ĉiujn tiajn operaciojn, kiujn ni faris. Tamen speciala hospitalo de plastia kirurgio estas nur unu, en Pekino. Ni elkulturis multajn fakulojn por aliaj lokoj de la lando, tamen juĝate en la tuto, la ĉina plastia kirurgio ne estas populara, nek evoluinta; menciindas, ke fakaj plastiaj kirurgoj estas ege malmultaj."

"Laŭ vi, kia do estas la perspektivo de plastia kirurgio en Ĉinio?"

Kun plena memfido la profesoro diris: "Brila estas ĝia perspektivo. Ĉinio havas siajn apartajn cirkonstancojn. Ĉi tie estas grandnombra loĝantaro, multaj pacientoj kaj diversaj malsanoj, kaj ni apilkas unufojan operacion en plastia kirurgio, kio povas multe malpezigi la ekonomian ŝarĝon de la pacientoj. Nia hospitalo ne ĉasas profiton kaj pagigas malmulte. Multaj pacientoj estas pagipovaj. Kaj plie, la kuraca sistemo de Ĉinio garantias la fundamentan kuracadon al la malsanuloj. Ĝuste pro tio ni povas konkludi, ke plastia kirurgio certe havos brilan perspektivon en Ĉinio." □

Jadaj skulptaĵoj

de ĜJA ŜU kaj ŬEJ LJAŬ

Jam en la ŝtonepoko ĉinaj prapatroj trovis jaden, specon de bonkvalita ŝtono, en farado de ŝtonaj iloj. Kaj ili faris el tia ŝtono ilojn kaj ornamaĵojn.

El la trovitaj jadaĵoj faritaj antaŭ 4 500 jaroj estas hakiloj, adzoj, ĉiziloj, tranĉiloj, porritaj iloj kaj ornamaĵoj.

Por prilabori la jadojn niaj prapatroj aplikis bareliefon, anaglifadon kaj aĵuradon. Ilia tekniko en polurado estis sufiĉe alta. Iuj elterigitaj plataj jadhakiloj, kiuj trapasis 4 000-5 000 jarojn subtere, nun ankoraŭ brilas ĉarme.

Ŝang-dinastio (la 16-a jc.-la 11-a jc. a.K.) estis grava periodo

de la disvolviĝo de la ĉina jada skulpturo, kio metis la bazon por la moderna ĉina jada skulpturo.

En 1976, kiam ĉinaj arkeologoj prifosis la tombon de Fuhaŭ, unu el la edzinoj de Uding, reĝo de Ŝang-dinastio, ili trovis 750 jadaĵojn. Ili estas la plej bone rafinitaj fadaĵoj de Ŝang-dinastio. La elterigitaj jadaĵoj povas esti dividitaj en du partojn: plataj kun bareliefo kaj tridimensiaj kun plena reliefo.


La bestaj kaj homaj figuroj de la plataj jadaĵoj plejparte estas prezentitaj en silueto, t.e. vivece prezenti la ĉefajn trajtojn de la objekto per precizaj konturoj. La jadaĵoj kun plena re-

liefo estas malpli multaj ol la plataj. Tamen ili havas pli allogan efekton ol la plataj pro sia reliefa arto. El tiaj jadaĵoj estas du elefantidoj, la plej vivece skulptitaj, en baza formo de kubo. La skulptisto en lakona realisma maniero precize prezentis la ĉefajn trajtojn de elefantido: dika korpo, pendantaj orelegoj, mallongaj kaj dikaj kruroj kaj kurba rostro. Per alta lakoneco kaj modera troigo la artaĵo donas pli fortan efekton.

El la jadaĵoj kun plena reliefo la hom-figuroj estas la plej okulfrapaj kaj okupas tre gravan lokon. Estas jada hom-figuro kun spirala ĉapo kaj en luksa vesto kun drakaj desegnoj kaj kun nubforma larĝa ornamaĵo oblique metita ĉe la larĝa zono. La jada figuro troigita aspektas majeste. La originaleco de la kreiva projektado de la aŭtoro kaj lia sukcesa skulptado superis ĉiujn aliajn similajn artaĵojn tiuflanke trovitajn iam antaŭe.

Heredinte la delikatecon kaj lertecon de antaŭuloj en farado de jadaĵoj, artistoj de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-23 p.K.) puŝis la jadan skulpturon antaŭen, t.e. oni pluapase ĝeneraligis la aĵuran teknikon, ne plu sin limigante en la simetria aranĝo, kaj sukcese prenis ekvilibran regulon por doni varian kaj elastan efekton. Ni prenu kiel ekzemplon "Bi en Figuro de Senkorna Drako sur la Fono de

Jadaĵo de Jangĝoŭ, unu el la ĉefaj produktaĵoj de ĉinaj jadaĵoj



Stalaktitsimilaj Vejnoj” (bi, antikva jada ornamaĵo, en diska formo kaj kun truoj en la mezo). Ĝin oni elterigis el la tombo de Liŭ Ŝeng, princo Ĝing de Ĝong-ŝan-princolando (la nuna gubernio Manĉeng de Hebej-provinco). La jadaĵo brilas blanke, kun subtilaj stalaktitsimilaj vejnoj ĉe ambaŭ siaj flankoj, sur ĝia supra parto estas dudraka anso kun besta korpo, birda vosto kaj tigra kapo kun faŭko malfermita. La korpo kaj vosto estas S-formaj, kio donas efekton de beleco ŝajne en movo. La detalaj partoj de la kapo, korpo kaj vosto estas delikate giloŝitaj. La rafinitaĵo reprezentas la nivelon de la jadaĵoj de la Okcidenta Han-dinastio.



Jada homo kun ornamaĵo ĉe la talio


La jadaĵa skulpturo prosperis senprecedence en la dinastioj Suj (581-618 p. K.) kaj Tang (618-907 p. K.) pro la socia stabileco. El la elterigitaj jadaĵaj skulptaĵoj de Suj-dinastio la blankjada taso kun ora ringo kaj blankjada braceleto ore inkrustita estas la plej

gravaj. Ili estas poluritaj delikate kaj milde brilantaj, krome la oro kaj jado beligas unu la alian, kio faras la jadaĵojn pli valoraj kaj pli karaj. La Plato kun Figuro de Fremdlandano en Jada Zono elterigita en Tang-dinastia kelo estis jadaĵo speciale

uzata de la tiama registaro. La artaĵo estas skulptita rustike, kio kongruas kun la stilo de siatempa freska kaj skulpta arto.

En la dinastioj Ĵuan (1279-1368 p. K.), Ming (1368-1644 p. K.) kaj Ĉing (1644-1911 p.K.) la jadaĵa prilaboro atingis sian kulminon de disvolviĝo kaj aperis multaj talentaj skulptistoj. La jadaĵoj en tiuj tri dinastioj estis uzataj pli vaste ol antaŭe. Tiam la jadaĵaj skulptistoj plene heredis la teknikojn de siaj antaŭuloj kaj faris rimarkindan progreson, ĉerpinte utilajn spertojn el la tiamaj pentrarto, kaligrafio kaj skulpturo. En kreado de artaĵoj kun temoj, kiaj pejzaĝoj, floroj kaj homfiguroj, la skulptistoj faris ĉion eblan por ke la jadaĵoj estu versimilaj kaj elvokivaj. Skulptante jadaĵojn kun pejzaĝa temo la tiamaj artistoj tre atentis pri diorama kaj fono. La plej tipa verko estas la jada skulptaĵo “Batalo de Daju kontraŭ Diluvo” de Ĉing-dinastio. La skulptistoj aplikis tri dioramajn teknikojn: bird-rigardan, de malsupre supren rigardan kaj horizontale ri-

Jadaj ornamaĵoj





Jadaj bovoj

kiaj vazo, parfumujo, *ding-o* (antikva ĉina ujo kun tri aŭ kvar piedoj kaj du ansoj) kaj *gong-o* (antikva ĉina vinujo el besta korno), nun varias en formo kaj giloŝo kaj atingis sian perfektecon.

Famaj skulptaĵoj nuntempaj estas farataj plejparte en Pekino, Ŝanhajo, Kantono, Jangĝoŭ de Ĝjangsu-provinco, Ĝinĝoŭ de Ljaŭning-provinco, Ĝiŭĉjŭan de Gansu-provinco, Harbin de Hejlongĝjang-provinco k. c. La verkoj de diversaj lokoj havas siajn proprajn trajtojn pro malsameco de materialoj kaj teknikoj. La pekinaj skulptistoj lertas vivece kaj subtile skulpti diversajn

(Daŭrigo sur p. 42)


gardan en tiu verko, kio faris pli impona la gigantan jadan skulptaĵon kun pezo de pli ol 5 tunoj.

La nuna jada skulpturo heredis la antaŭajn atingojn, multe disvolviĝis en projekto de la formo kaj prilaboro de la skulptaĵoj

kaj superis la antaŭan en multaj flankoj. Tiel formiĝis la moderna stilo kaj multe kreskis la nombro de specoj de artaĵoj, precipe en projekto kaj prilaboro de homfiguroj, floroj, bestoj kaj birdoj. Eĉ la tradiciaj artaĵoj,

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO


- | | | |
|-------------|----------------------|-------------|
| 1. Ĉongĉing | 6. Juŝjan-gubernio | 11. Ŝanhajo |
| 2. Ĉengdu | 7. Ĝongdjan-gubernio | 12. Ŝjan |
| 4. Ĉangŝa | 8. Ĉangŝu | 13. Ŝenjang |
| 3. Uhan | 9. Ŝaĝoŭ-gubernio | 14. Nankino |
| 5. Kantono | 10. Pojang-lago | |






*Jada drako de
Ŝang-dinastio
(17-a jc. —
11-a jc. a.K.)*


Jada taso kun birda desegno de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.)







Blankjada bovlo kun drakformaj oreloj de Ming-dinastio (1368-1644 p. K.)

*Jada pendaĵo de la
Periodo de Militantaj
Regnoj (475-221 a.K.)*



Skulptaĵo el agato kun akvo ene (Nuntempo)






Ornama pendaĵo (Nuntempo)



Jada skulptaĵo de Anjang (Nuntempo)



Jada ujo (Nuntempo)



Jada skulptaĵo de Ĉing-dinastio (1644-1911 p.K.) pri batalo de Daju kontraŭ diluvo, kun alto de 2.24 metroj, larĝo de 0.96 metro kaj pezo de 5 330 kg.

Rememoro kaj deziro

—Dediĉe al la centjara jubileo de Esperanto

de LOŬ ŜIJI*

Iutage en la komenco de la 20-aj jaroj mi aĉetis verdkovrilan broŝuron kun titolo "Esperanto" en Ĉjunji-librejo en Ŝanhajo. El ĝi mi eksciis, ke Esperanto estas internacia lingvo, kreita de pola d-ro Zamenhof. Ĝi estas facile prononcebla, gramatike logika kaj facile lernebla. En la knabeco mi, malriĉa, perdis la ŝancon viziti lernejon. La kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma Maj-Kvara Movado de la ĉina popolo en 1919 vekis mian deziron lerni. Mi avidis klerecon kaj precipe deziris ellerni almenaŭ unu fremdan lingvon. Tamen la tiama kondiĉo nur permesis al mi memlerni en liberhoroj, kaj mi ofte ne povis daŭrigi la lernadon. Kiam mi renkontis en la lernado malfacilojn en prononcado kaj gramatiko, mi kvazaŭ eniris en malluman arbaron kaj ne povis trovi elirejon. La broŝuro lumigis al

mi la vojon en labirinto kaj mi decidis lerni Esperanton. Mi kune kun kelkaj amikoj do eklernis Esperanton en malgranda vesperlernejo funkciigata de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio 3 fojojn ĉiusemajne spite venton kaj pluvon.


Nia instruisto estis Ĉen Ĝaŭjing. Ankaŭ li estis junulo, preskaŭ samaĝa kiel ni. Tage li laboris eble en iu kompanio aŭ banko, vespere li senrekompence instruis Esperanton. Lia instrumentado estis vigla. Por eksciti nian avidon al klereco, li ofte uzis vivecajn figuraĵojn en la kurso, kiaj pentraĵoj, veraj objektoj, kantoj, humuraĵoj kaj rakontoj. Li konigis al ni, kia estas la esperantisma idealo de Zamenhof kaj kial la homaro devas uzi komunan lingvon por akceli la interkomunikiĝon kaj interkomprenon, pace vivi kaj kune progresi. Tio estis granda

kuraĝigo por ni junuloj, malcontentaj pri la duonkolonia kaj duonfeŭda socio. Esperanto vere donis al ni grandan esperon kaj multe levis nian entuziasmon en la lernado.

Tiam s-ro Ĉen estis fraŭlo kaj loĝis en malgranda mansardo en iu magazeno de Hongkoŭ-kvartalo. Sur lia librobretaro estis multaj esperantaĵoj. Ni ofte prunteprenis de li legaĵojn. Li montris al ni leterojn de alilandaj esperantistoj kaj interŝanĝitajn bildojn kaj kuraĝigis nin korespondi kun alilandaj samideanoj. En alilandaj esperantaĵoj ofte legeblis korespondaj anoncoj en speciala rubriko, kie iuj esprimis sian deziron korespondi aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn, bildojn k.a., kun ĉinaj esperantistoj. Tiam nia esperanta nivelo estis malalta. Li kuraĝigis nin skribi leterojn kaj korektis por ni la skribaĵojn serioze. Helpate de li ni adresis leterojn al alilandaj esperantistoj. Ni eĉ amikiĝis kun iuj malproksimaj eksterlandanoj. Inter miaj korespondaj amikoj estis ĉeĥoslovaka knabino, kiu ŝatis kolekti ĉinajn poŝtmarkojn. Mi sendis al ŝi ĉinajn p.m. kaj ŝi siavice sendis al mi bildojn pri pejzaĝoj de Prago. Mia alia korespondanto estis juna jugoslava laboristo, kiu tre atentis pri la monda situacio kaj la ŝtataj aferoj. Li ofte skribis al mi leteron tre longan, kiun mi ne povis tute kompreni eĉ helpate de vortaro. Tiukaze mi do devis peti helpon de s-ro Ĉen.

Loŭ Ŝiji (la dua de maldekstre) en la inaŭguro de la societo "Amikoj de Esperanto"





Loŭ Ŝiji (maldekstre) kaj Ĉen Ĝaŭjing

Poste nia malgranda biblioteko translokiĝis al nova loĝejo, kiun kune luis ni kaj la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, de tiam pliintimiĝis la rilato inter ni kaj la asocio. La asocion prezidis s-ano Hujucz, kaj multaj el ni fariĝis ĝiaj membroj. La oficejo de la asocio okupis la supran etaĝon de la biblioteko. Tie ofte pasloĝis ĝiaj membroj. Tie mi konatiĝis kun s-roj Bakin kaj Ŭang Lujan. La rezidanta laboranto de la asocio estis mia bona amiko kaj samvilaĝano Ŝju Junĉjan, kiu antaŭe estis dungito de iu banko, poste li senlaboriĝis kaj fariĝis volontulo de la asocio. Tiam li sin okupis ĉefe pri la laboro de la koresponda lernejo de Esperanto. Li kaj kompilis lernilojn kaj korektis la ekzercojn de la lernantoj. Ĉiutage li diligente laboris de matene ĝis vespere. Post laborado ni kune ludis, lernis kaj kverelis.

S-ro Ĉen aliĝis al la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu eldonis sian organon "Sennaciulo". Mi do fariĝis ĝia leganto. La revuo ofte publikigis Esperantajn originalojn kaj esperantigitajn mallongajn artikolojn, poemojn kaj novelojn de Sovetunio, orienta Eŭropo kaj Germanio, kiuj tre interesis min kaj funkciis kiel ponto inter mi kaj Esperanto. Mi renkontis en la asocio ankaŭ eksterlandajn esperantist-turis-

tojn. Estis juna hungara laborist-esperantisto, kiu ne havis eĉ unu groŝon, tamen ĵuris vojaĝi tra la mondo. Kiu portis sur la brusto verdan insignon, tiu estis lia amiko. Ĉie li renkontis helpajn manojn kaj li ĉie sukcese trovis provizoran laboron. Restinte ie, li perlaboris sufiĉe da mono kaj daŭrigis sian vojaĝon.

Mi vagis kiel senlaborulo de 1927. Komence mi intencis min vivteni per verkado. Ĉar mi estis ne kapabla en la verkado kaj ne povis vivteni min, mi do turnis min al tradukado. Unue mi ĉinigiis la Esperantan originalon de Eroŝenko "Lulkanto" kaj ĝin publikigis la tagdeka revuo "Matenaj Floroj" sub la aŭspicio de la fama literaturisto Lusin. Poste la literatura societo Suno starigis semajnan revuon "Marvento", kies ĉefredaktoro urĝis min je kontribuajoj. Por plenumi la urĝan bezonon mi ĉinigiis mallongajn poemojn kaj artikolojn el "Sennaciulo". Kuraĝigite de tio mi komencis okupiĝi pri tradukado. En 1929 por prepari la monon bezonatan por la vojaĝo al Japanio mi kolektis miajn tradukaĵojn en broŝuron kun titolo "Ponto", kiu signifas, ke mi iras al la mondo kun Esperanto kiel la ponto. La broŝuro estis presita de la Eldonejo de la Literatura Librejo. Ĝi estis mia unua

traduko. Bedaŭrinde, ĝi perdiĝis.

En Tokio baldaŭ mi trovis japanan Esperantan organizon. Tie funkciis malgranda Esperanta librejo, kie mi trovis multajn esperantajn eldonaĵojn neviditajn en Ĉinio. Mi aĉetis la dramon "La Morto de Danton" de A. N. Tolstoj kaj ĉinigiis ĝin. Ĝi estis eldonita de la Komerca Presejo de Ŝanhajo.

Post kiam mi revenis al la patrolando, fondiĝis la Ĉina Proleta Esperantista Unio en Ŝanhajo. Kvankam mi aliĝis al ĝi, tamen mi laboris ĉefe en la Ĉina Maldekstra Verkista Unio kaj la Asocio de la Ĉinaj Maldekstraj Kulturaj Rondoĵoj. Kiam Ĵelezo, Tikos kaj aliaj esperantistoj fondis la revuon "La Mondo" kaj la Esperantan vesperan lernejon kaj denove vigligis la ĉinan Esperanto-movadon, mi ne plu okupiĝis pri konkretaj esperantaj laboroj.

En palpebruma daŭro forpasis duonjarcento. En 1982 invitate de Ĵelezo kaj Ĝang Ĉjiĉeng, mi ĉeestis solenan Esperantan kunvenon en la Popola Halo kaj sidis sur podio kiel veterana esperantisto, mi hontis pro tio. En la kunveno multaj samideanoj parolis en Esperanto, mi tamen komprenis nur iujn vortojn kaj frazojn. Mi ĝojis, ke la ĉina Esperanto-movado jam disvolviĝis senprecedence subtenate de la registaro, kion ni deziregis en la juneco. En la kunveno mi renkontis Ĉen Ĝaŭjing, pli ol 80-jaran, kiu instruis min antaŭ 60 jaroj. Eble li jam forgesis min, tamen mi memoras lin ĉiam. Mi varme brakumis lin. Mi estis ege ekscitita. Bedaŭrinde ni disiĝis tro rapide kaj mi ne povis vidi lin pro lia forpaso.

La renkontiĝo kun s-ro Ĉen rememorigis min pri alia merito-

plena samideano en la ĉina Esperanto-movado Ŝju Junĉjan. Li persone partoprenis en la strata batalo de la tria ribelo de la ŝanhajaj laboristoj. Reveninte hejmvilaĝon, li partoprenis en la armita ribelo de kamparanoj. Sed en la komenco de la 30-aj jaroj li kaj lia edzino, nia amikino Ĝu Junĉing, mortis unu post la alia de malsano kaj malriĉeco, forlasinte sian filon. Mi pensas, ke ni devas memori pri tiuj personoj, kiaj li kaj s-ro Ĉen, kiuj faris penigan pioniran laboron en la komenca periodo de la ĉina Esperanto-movado.

Mi kaj miaj kunlernantoj jam en la juneco kredis, ke Esperanto certe fariĝos la dua lingvo por diverslandaj popoloj. Dank'

al la komuna lingvo, la diversaj landoj, nacioj kaj popoloj formas fratecan kaj interhelpan familion, kune eniros en idealan mondon sen ekspluato kaj subpremo. Ni ankaŭ kredis, ke la plej grand-skalan disvastiĝon Esperanto ŝuldos unue al la subteno de la ŝtato. Nun, en Ĉinio tio realiĝis. El Popola Ĉinio, kiel nia grava Esperanta revuo, konigas per nia lingvo la okazaĵojn de la Ĉina Popola Respubliko al la mondo kaj aktive akcelas la amikecon inter ni kaj alilandaj popoloj. La 71-a UK kun partopreno de miloj da diverslandaj esperantistoj okazis en Pekino. Miloj kaj dekmiloj da junuloj lernas Esperanton kaj uzas ĝin. Jen prosperas senprecedence Esperanto en

Ĉinio, post kiam ĝi enkondukiĝis en Ĉinion antaŭ pli ol 80 jaroj.

Okaze de la centjara jubileo de Esperanto, mi elkore deziras, ke la ĉina Esperanto-movado pli disvastiĝu kaj niaj posteuloj prenu Esperanton kiel la duan lingvon kaj kune kun alilandaj samideanoj strebu por efektiviĝi la idealon de Zamenhof. Tiu idealo ja kongruas kun la alta idealo aspirata de la ĉina popolo. □

** La aŭtoro estas fama ĉina verkisto, tradukisto kaj iniciatinto de la Ĉina Proleta Esperantista Unio. Nun li estas honora konsilanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj membro de la societo Amikoj de Esperanto.*

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

X-a Jaro N-ro Y (Z)
Monato-Jaro

ĈIAM AKTUALA KUN DAŬRA HISTORIA VALORO
IDEE RIĈA, LINGVE ALTNIVELA, PROFESIE ILUSTRITA

Redakta Komitato: S. Gumà, I. Lapenna, J. Thierry, E. de Zilah
Kvindeko da kunlaborantoj el multaj landoj

APERAS SES FOJOJN JARE, MINIMUME 24 AŬ 28 PAĜOJ PLUS 4 KOLORAJ KOVRILPAĜOJ


EN 1987 ABUNDAJ OBJEKTIVAJ KAJ PRECIZAJ INFORMOJ PRI LA
JUBILEA ESPERANTO-JARO

Jarabono 12o danaj kronoj aŭ egalvaloro

ABONOJN AKCEPTAS

ADMINISTRACIO DE HORIZONTO
NØRREGARDSVEJ 91, DK-2610 RØDOVRE,
KOPENHAGO, DANIO, POŜTĈEKKONTO DE
ICNEM KØBENHAVN 1 19 06 01
KAJ PERANTOJ EN MULTAJ LANDOJ





OTTO NITSCHÉ (FR Germanio):

Miaj vojaĝimpresoj pri Ĉinio

La aŭtoro

Vojaĝi al Ĉinio certe estas pli ol aviade transsalti oceanojn, landojn kaj tempozonojn. Nin eŭropanojn impresis kaj akceptis tute alia mondo, nekutima lingvo, kulturo kun 5 000-jara historio de popolo granddisciplineca kaj prudenta. Impresis nin la pasinteco kaj la nuntempo de popolo, kiu ĉion kaj ĉian transvivis.

De la 23-a de julio ĝis la 16-a de aŭgusto 1986 ni estis kune: 14 esperantistoj venintaj el Hungario, Svedio, Svislando kaj FR Germanio. La Esperanto-Centro Paderborn organizis la vojaĝon al la 71-a UK en Pekino, kie ni restis naŭ tagojn.

Nia longe atendata vojaĝo komenciĝis en Frankfurt. Post 14-hora flugo ni bone surteriĝis akurate je la indikita tempo en flughaveno de Pekino.

Kia surprizo! En la aerodromo ni estis kore akceptataj de niaj pekinaj amikoj Xu Shanshu, Bai Kangbin kaj Lu Binsheng. Jaron antaŭe ili ĉeestis la 70-an UK en FR Germanio kaj post la kongreso gastis en familioj loĝantaj en Paderborn, Duisburg kaj Hamburg.

Post la dogana proceduro per aŭtobuso ni veturis al nia hotelkomplekso Amikeco. Menciindas la sternigitaj frukto-ĝardenoj kaj bone kulturitaj legomkampoj en la periferio de Pekino. Estis frua vespero kaj amaso da biciklantoj estis revenantaj el siaj laborejoj al siaj dometoj, kiuj troviĝas dise ambaŭflanke de la strato. En tiuj malnovaj dometoj plej ofte ankoraŭ nuntempe oni loĝas trigeneracie. La problemoj de mankantaj loĝejoj en la urboj ne estas solvitaj. Pli kaj pli oni anstataŭigas dometojn per multetaĝaj loĝdomoj. Okulfrapas ankaŭ modernaj divers-stilaj hoteloj, oficejoj kaj la multkoridoraj avenuoj kun larĝaj trefkruciĝoj. Eminentas estas la vigleco sur la stratoj, trotuaroj kaj grandaj placoj.

En magazenoj kaj kioskoj oni trovas ĉiajn varojn, ĉu temas pri nutraĵo, pri vestaĵoj, pri mebloj, pri elektraĵoj aŭ pri fotoĵoj. Kolorfilmo por foti, ricevilo por kolora televido, lavaŝino aŭ fridujo ankoraŭ estas lukso por la plej multaj ĉinoj pro la alta prezo. Do, ĉio estas amase havebla. Tio ankaŭ estas kaŭzo pro nova ekonomia sistemo.

Ni baldaŭ al kutimiĝis al la varmeco, al la ĉinaj pladoj kaj al la homamasoj, kies helpemo kaj afableco estas mirindaj. Certe neniam ni al kutimiĝas al la lingvo kaj al ties ideografio. Al ni helpis niaj ĉiĉeronoj, do ĉefe ankaŭ ĉinaj esperantistoj. Ni aparte volonte rememoras pri la agrabla kunestado kaj interparoloj kun la lokaj esperantistoj en diversaj urboj.

Dum unu semajno Pekino fariĝis pli internacia pro la plej granda kongreso ekster Eŭropo. Kiel kutime 22 fakaj asocioj kunvenis. Kongresejo estis la Scienca Halo, 4-etaĝa altlernejo en ĝardena ĉirkaŭaĵo 100 metrojn for de nia hotelo. Kongresanoj bezonis tagojn por eltrovi kaj renkonti siajn geamikojn. Ankaŭ mi serĉis. Kia ĝojo! Post longa serĉado mi sukcesis trovi mian longjaran ĉinan leteramikon Yang Chung-kun veninta el Wuhan. Li estas tre aktiva kaj favora esperantisto, unu el miaj plej sinceraj amikoj. Ni tre kore kaj sincere brakumis unu la alian, la unuan fojon ni estis kune. Ni estis la unua paro de korespondantoj inter la du ĝemelurboj Duisburg kaj Wuhan.

La solena inaŭguro kaj ĉiuj vesperaj aranĝoj estis en la moderne ekipita ĉina teatro. Unika plezuro kaj kulmino estis la lukse prezentita baletoj "Sur la Silka Vojo". Pli ol 40 profesiaj aktoroj prezentis kunigon de la folkloraj kaj klasikaj motivoj ankaŭ el pasintaj dinastioj. La kolorriĉaj kostumoj, arte ekipita scenejo kaj por ni eŭropanoj iomete fremdsona muziko bonege akordiĝis kun la preskaŭ ŝvebante moviĝantaj aktoroj. Preskaŭ senĉesa aplaŭdo multfoje aprobis ĉiujn aktorojn. Neniam antaŭe mi vidis similan eminentan prezentadon unikan.

Unikaj ankaŭ estas la vidindaĵoj, nuntempaj kaj pasintaj. Dum la ekskursita tago pli ol 50 aŭtobusoj veturis al la Granda Muro kaj al grandiozaj maŭzoleoj de Ming-dinastio. Kia pitoreska, pentrinde ĉarma naturo! Kiel impona impresio de la giganta remparo, kiu zigzagas kiel serpento inter krutaj montvertoj kaj profundaj valoj.

Vidindas la Imperiestra Palaco, kie rezidis 24 imperiestroj. Grandaj pompaj kortoj kaj multaj imponaj ĉinstilaj konstruaĵoj destiniĝas garantii luksan vivon.

S-ro Krings (la tria de maldekstre frontrigarde), la urbestro de Duisburg, akceptas esperantistojn de Ĉinio, FR Germanio, Pollando kaj Bulgario en la urבודomo. La kvara de maldekstre frontrigarde estas la aŭtoro.



Rekte antaŭ la iama Imperiestra Palaco troviĝas Tian'an-men-placo. Imagu, laŭdire miliono da homoj samtempe povas kolektiĝi sur tiu placo.

Ĉiam denove mi estis ravita de belaj ĉinaj ĝardenoj. Tiuj tute diferenciĝas de la italaj aŭ francaj. La plej granda kaj plej bone konservita el la ĉinaj imperiestraj ĝardenoj estas la Somera Palaco ekster la urbo de Pekino. Ĝi okupas 290 hektarojn, tri kvaronoj de ĝi estas akvo. Troviĝas en ĝi turoj, pavilonoj, haloj, muzeoj, belegaj pontoj kaj insuletoj. Ĉio akordas harmonie kun la vere pitoreska pejzaĝo kaj estas klasika ekzemplo de ĉina imperiestra ĝardeno. Ankaŭ mirindas ĉi tiu plej longa ĝardenkoridoro en Ĉinio. Sur traboj kaj plafono estas pentritaj ĉinaj pejzaĝoj, epizodoj el folkloro, kaj floroj kaj birdoj. Estas vera artaĵo.

Al ni oni dediĉis multajn bankedojn oficialajn. Do, elstaraj estis la privataj bankedoj en la familioj de miaj amikoj Bai Kangbin loĝanta en Pekino kaj de Yang Chung-kun loĝanta en Wuhan. Du tagojn antaŭe la edzinoj komencis prepari ilin,

laŭ ĉina tradicio kun aparta gusto. Nun ĉinoj nur malofte bankedas. Ĉirkaŭ 10-15 pladoj estas ĉe bankedo. Tiuj familiaj festoj por ni ĉiuj estis elstaraj, kulminaj kaj neforgeseblaj. Kia gajeco! Kia etoso! Esperantistoj eĉ en la plej foraj kaj ekzotikaj landoj havas eblecon gastigi en ordinaraj familioj, dank' al nia komuna lingvo kaj nia idealo pace kaj amike interligi homojn mondwide. Turistoj plej ofte nur revas pri tio, ili plej ofte nur gastas en hoteloj, gastejoj.

Post la kongreso ni flugis al Chongqing, ŝipe veturis sur Jangzi-rivero tra la Tri Gorgoj. Nian plej interesan ekskurson ni havis al la fame konataj ŝtonskulptaĵoj de Dazu. En diversaj grotoj troviĝas dekmiloj da ili, ĉizitaj antaŭ mil jaroj. Ĉio vere estas multvalora trezoro el pasintaj epokoj.

Vizito de privata bieno estis kulmino por ni ĉiuj. Ŝajnis, ke ni ne estis anoncintaj. En la vizitata bieno oni vivas trigeneracie. Juna edzino montris al ni ĉiujn ĉambrojn, la kuirejon kaj la bestejojn. Oni estis tre afabla al ni. Ĝenita estis la bebo, kiun vekis ĝia patrino por prezenti ĝin al ni, kaj ĝenita estis la avo pro interrompo de sia laboro. En la korto li turnis maizon. Bebo kaj infanoj akceptas la homan varmecon kaj amon de ĉiuj kaj poste kiel plenkreskuloj prizorgas siajn maljunajn gepatrojn. La geavoj ĝuas grandan respekton de ĉiuj familianoj kaj ankaŭ havas sian ĉiutagan taskon.

Per luksa ŝipo "Ermei" ni ekskursis sur Jangzi, unu el la plej longaj riveroj de la mondo. Jangzi longas 6 350 km. Vidindaĵo unika en la mondo estas la Tri Gorgoj aŭ kanjonoj, kiuj



Ĉinaj Esperantaĵoj kaj metiartaĵoj montrataj de la aŭtoro

La aŭtoro (la kvara de maidekstre en la malantaŭa vico) en Kantono

etendiĝas preskaŭ 200 km. La vertikalaj montoj ambaŭborde estas unu el la plej fantaziaj naturaj vidindaĵoj same ranga kiel la Granda Muro. Vidindas tie la temploj kvazaŭ gluitaj al rokoj. Ekzistas amaso da legendoj kaj poemoj pri tiu kreaĵo. La posta nelogata ebena pejzaĝo sterniĝas kvazaŭ horizonte. Jarojn antaŭe ŝipestroj timis tiujn montgorĝojn pro ties danĝeraj malprofundaĵoj kiel subakviĝintaj rokoj aŭ vorticoj. Navigado post mallumiĝo estis vetludo per la vivo. Ofte ŝipoj alfundiĝis kaj homoj pereis. Nun la rokoj estas forigitaj; krome oni ankaŭ konstruis signalstaciojn.

Granda Esperanto-grupo aten-

dis nin sur la kajo de Wuhan vid-al-vide de la 24-etaĝa luksa hotelo Ĉingĉuan. Tie ni loĝis du tagojn. En aŭtuno de 1982 nia urbestro Krings kun delegacio loĝis en la sama hotelo. Tiutempe Wuhan kaj Duisburg ĝemeliĝis. Ĉinaj kaj germanaj gazetoj grandformate raportis pri la ĝemeliĝo. Ankaŭ pri mia vojaĝo Duisburgaj gazetoj skribis.

Wuhan havas 4 milionojn da loĝantoj. Ĝi estas la ĉefurbo de Hubei-provinco kaj situas ĉe la enfluo de la rivero Hanshui en Jangzi. Impresas la giganta, moderne konstruita 2-etaĝa pontego por fervojo kaj strato transirante Jangzi-riveron en alteco de 80 metroj kaj longeco

de 1 700 metroj. Kia kolosa dimensio finkonstruita en 1953! En pasintaj tempoj la homa sorto ofte dependis de Jangzi-rivero kaj de digoj. Kiom da fojoj la rivero jam inundis kampojn, detruante la rikoltojn kaj dronigante homojn kaj bestojn? Feliĉe dum la lastaj jaroj tiuj katastrofoj fortege mildiĝis, homoj ne plu dronis.

Wuhan havas centojn da esperantistoj. Mia frata amiko Yang Chung-kun kun siaj samideanoj bonege prizorgis nin. Mi kun du aliaj grupanoj estis invititaj al la Scienca-Teknika Esperanto-Asocio de Hubei-provinco por prelegi. Pli ol 70 ĉefe junaj aŭskultantoj dankis min per granda aplaŭdo.

Kvarope dumvespere ni estis gastoj en la familio de Yang Chung-kun. Ni konatiĝis kun la ĉarmaj, amindaj edzino, filino kaj filo. Vere festenan bankedon ni havis, bonege ni estis regalitaj. Regis vere amikeca etoso en tipa ĉina loĝejo kun, laŭ nia takso, malgrandaj ĉambroj modeste ekipitaj. Mia amiko laboras kiel mezlerneja instruisto.

Kvazaŭ reliefa pentraĵo sternaĝas vasta regiono de la Orienta Lago. Ĝi estas vera oazo de kvieto kaj malstreĉiĝo por Wuhan-urbanoj kaj turistoj. Meze de montetoj kaj inter lagoj prosperas arboj kaj floroj, pompas diversformaj pavilonoj kaj ĉinstilaj turoj. Ni boatekskursis kaj promenis ĝuante belan posttagmezon en la somera pitoreskejo.

Varman kaj emocian kunecon de multaj junaj esperantistoj ni ĝuis dum la lasta vespero en la korto de nia hotelo. Senĝene kaj amike ni interparolis pri multaj temoj. Montriĝis granda intereso pri Eŭropo kaj pri Germanujo. En gaja kaj harmonia societo ni ankaŭ interŝanĝis donacetojn kaj adresojn.

Du tre agrablajn tagojn ni havis en Wuhan, dank' al mia amiko Yang Chung-kun kun familianoj, kaj dank' al tieaj samideanoj. Vere estis plia kulmino dum nia vojaĝo. Post koremo adiaŭo antaŭ nia hotelo, ni denove estis en la aerodroma halo de Wuhan.

Du tagojn ni gastis en Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco same granda kiel Francujo. Ni vizitis agrikulturan kooperativon kun propraj lernejo kaj hospitalo. Ni rigardis vastajn rizkampojn kaj lernis pri metodoj de teo-preparado. Precipe interesa estis la pli ol 2 000-jara vasta sistemo por irigacii la

kampon. Vere mirindan ingenieran laboron ĝi montras. Tiu akvosistemo ankoraŭ hodiaŭ bonege funkcias kaj nuntempe akvumas regionon de 6,7 milionoj da hektaroj.

Budhistoj invitis nin al konvena teopaŭzo, vere tre agrabla refreŝigo pro la varmego. Ni bonege informiĝis pri la ĉiutaga vivo de monaĥoj. Oni vivas kaj loĝas modeste. Ilia kredo ne permesas manĝi viandon, ovaĵojn, fiŝaĵojn aŭ trinki alkoholaĵojn. La ŝtato subvencias monaĥojn per mono. Ĉefe gejunuloj loĝantaj en la urboj tute ne plu interesiĝas pri budhismo.

En Changsha, la ĉefurbo de Hunan-provinco, ni estis kondukitaj ekskluzive de tieaj samideanoj. La loka Esperanto-Asocio efike kunlaboras kun la turisma servo. En Ĉinio ĉiam denove estas malkovrataj sensaciaj eltrovaĵoj el pasintaj epokoj. Tiuj trovaĵoj permesas esplori la politikon, ekonomion, kulturon, sciencan kaj teknikan de la pasinteco.

En 1972 oni elterigis el tri tomboj tre valorajn objektojn de Markizo Li Cang, kiun oni entombigis antaŭ 2 100 jaroj kun liaj familianoj. Ekzemple oni elfosis 30 specojn de silkaj libroj kun 120 000 ideografiaĵoj pri astronomio, medicino k.a. Ankaŭ troviĝis en la tomboj amaso da manĝaĵoj eĉ kun nutraĵo, vinujoj k.a. Plej okulfrapa, eĉ unika eltrovaĵo estis la kadavro de virino. Ĝi estis sendifekta, eĉ la nigra hararo konserviĝis. Nenio malkomponiĝis, kvankam tiu kadavro ne estis preparita kiel mumio.

En Kantono, kvinmiliono metropolo, ne nur la homoj kore akceptis nin esperantistojn, sed ankaŭ subtropika klimato. Pli

ol 3 200 fabrikoj kaj vasta havenkvartalo atestas la gravecon de la urbo. Vere agrable kontrastas verdaj parkoj, oazoj de kvieto. Nepre vizitindas la libera stratbazo, kie homamasoj kun scivolemo rigardas kaj marĉandas je multspecaj varoj. Etendiĝas vicego da ofertitaj, diversspecaj vivantaj birdoj, bestoj kaj fiŝoj, tenitaj en kaĝoj aŭ vitraj ujoj. Aliaj komercadas per multodoraj spicoj, fruktoj aŭ teo, kvazaŭ en orienta foiro. Nuntempe komercistoj lertaj en negocado aviadivas el multaj landoj al la printempa kaj aŭtuna Kantonmerkatoj por oferti siajn varojn.

Nun la pordoj de Ĉinio estas vaste malfermitaj al Eŭropo, Usono, Japanio kaj aliaj landoj. Ĝi moderniĝas kaj la tekniko evoluas. Sed ankaŭ multaj ĉinoj laboras permane, sen maŝinoj.

Ni observis produktadon de porcelanaĵoj kaj ankaŭ silko-manufakturon de la komencaj ĝis finpretaj objektoj. Ni admiris la delikatajn fingrojn de junulinoj, kiuj lerte brodis aŭ pentris valorajn objektojn, kaj ni observis la faradon de jado-skulptaĵo. Vere mirindaj artobjektoj. Mi povas konfesi, ke mi vidis multon.

Neforgesebla estas la panoramo de la giganta ponto de Wuhan trans Jangzi-rivero. Sed plej grava estas la kontakto kun ĉinaj geamikoj. Preskaŭ en ĉiuj lokoj atendis nin afablaj esperantistoj. Multajn interparolojn mi ĝuis kun gejunuloj. Mirindas, ke neniam mi aŭdis plendon pri la vivkondiĉoj (laŭ nia takso oni vivas modeste, kaj la ĉiutaga laboro postulas grandan forton), kaj ankaŭ ne regis malkontento. Eble ni povas lerni el tio.

Mia plej riĉenhava vojaĝo en Ĉinio restos ĉiam neforgesebla. □

Por Krei Pacan Belan Mondon

— Celebre al la 100-jara Jubileo de Esperanto

Kore, varme, mezrapide

Poemo de Laŭlum
Muziko de Lju Ĝji

mf

Virino
Viro

Baso


Kun-kan-tu ka-ra ko-le-ga-ro En ĉi-uj
Flu-gi-lojn svin-gas la ho-ma-ro, Nek mont' nek

Kan-tu ĉi-uj
Al ho-ma-ro



ur-boj kaj kam-pa-ro, Su-su-re e-ĥu la ar-
ma-ro plu 'stas ba-ro. Ĉu ho-moj ni-graj, ho-moj

en la ur-boj kaj kam-pa-ro, Su-su-ra-du
mon-toj, ma-roj, ne plu ba-ro. Ho-moj ni-graj,



ba-roj, Re-so-nu ĉi-uj mon-toj, ma-roj!
blan-kaj Ĉu fla-vaj, bru-naj aŭ ruĝ- van-gaj,

la ar-ba-roj, e-ĥu ĉi-uj mon-toj, ma-roj!
ho-moj blan-kaj, fla-vaj, bru-naj aŭ ruĝ- van-gaj



ff Pli rapide

Ĝoj- kan- tu, kan- tu ni- a tu- ta te- ro Pri l'
U- zan- te l' Es- pe- ran- tan, lin- gvan pon- ton, Kun-

Es- pe- ran- ta cen- ta ja- ro, Ĝoj-
a- gu jam en so- li- da- ro, U-

kan- tu, kan- tu ni- a tu- ta te- ro, Pri
zan- te l' Es- pe- ran- tan, lin- gvan pon- ton, Por

a- mi- ke- co, pri es- pe-
kre- i pa- can be- lan mon-

ro! don! Ĝoj- ro!
U- don!

POR LA CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO

En la pasinta duonjaro diverslokaj Esperantaj organizoj de Ĉinio festis la centjaran jubileon de Esperanto en diversaj manieroj. Kune kun la Ĉangĝoŭ-a Porinstruista Instituto, la Ĉangĝoŭ-a Esperanto-Asocio okazigis Esperantan ekspozicion en la fino de februaro kaj komenco de marto por montri materialojn pri disvastigo de Esperanto en Ĉinio, Esperantajn librojn kaj gazetojn, kaj leterojn kaj donacojn de alilandaj gesamideanoj. Lokaj ŝtatoficistoj vizitis la ekspozicion kaj lokaj radioj kaj ĵurnaloj raportis pri tio.

Por festi la centjaran jubileon de Esperanto kaj pli bone propagandi kaj disvastigi Esperanton, la Televid-stacio de Ŝenjang kaj la Ŝenjang-a Esperanto-Asocio kune organizis Esperantan kurson en televido, kun pli ol ses mil lernantoj. La kurso ekfunkciis en la 23-a de aprilo. Ĝi estas teleŝendata inter 17:30 kaj 18:10 ĉiutage, ĉiŝaŭde kaj ĉiŝabate kaj ĝia semajna leciono ripetata inter 15:00 kaj 17:00 ĉiudimanche. La kurso daŭros duonjaron. En la 186-a kaj 188-a numeroj de "Verda Lampiro", mimeografita Esperanta gazeto, eldonata de la urbo Ĉangŝu de Ĝjangsu-provinco, publikiĝis ses projektoj de memorigaj poŝtmarkoj faritaj de Ĝang Linĵuj por festi la centjariĝon de Esperanto. Tiuj poŝtmarkoj kun pli ol dek koloroj estis alte taksatataj de legantoj pro la riĉa imago kaj bona aranĝo.

RADIO PEKINO PETAS ARTIKOLOJN POR LA 40-A DATREVENO DE SIA FONDIĜO

Radio Pekino, kiu ĉiam aktive subtenas Esperanton, festos en

septembro la 40-an datrevenon de sia fondiĝo. En la 11-a de septembro 1947 Radio Pekino komencis elsendon al la mondo. Nun ĝi ĉiutage laboras per 38 fremdaj lingvoj, unu nacia lingvo kaj kvar dialektoj de Ĉinio. Jam 23 jarojn ĝi disaŭdigis Esperantajn programojn kvarfoje ĉiutage, ĉiufoje por tridek minutoj. Ĝi estas unu el la influaj radioj de la mondo.

Por celebri la 40-an datrevenon de sia fondiĝo kaj pliintimigi la rilatojn kun la aŭskultantoj, Radio Pekino lanĉis kampanjon, inter marto kaj septembro, por peti artikolojn kun la temo "Mi kaj Radio Pekino". Ĝi petas siajn aŭskultantojn prezenti opiniojn, kritikojn kaj proponojn por plibonigi ĝian laboron. Bonvenaj estas ĉiuj artikoloj, ĉu longaj aŭ mallongaj, ĉu en tia aŭ en alia formo. La kontribuintoj ricevos ateston pri kontribuaĵo, filatelan tutaĵon kaj memorigan insignon. Oni elektos la bonajn kaj donos la premiojn 1-an, 2-an, 3-an kaj

4-an, inter kiuj estas ĉinstila pen-trajo, apogkuseno kaj silka kap-tuko. Iujn el la artikoloj oni poste disaŭdigos. Esperantistaj aŭskultantoj sendu siajn artikolojn rekte al la Esperanta Sekcio de Radio Pekino.

LA REVUO "FILATELO DE ĜJANGSU" PREZENTIS ESPERANTAN FILATELON

Sub la titolo "La filatelaĵoj 'Esperanto — artefarita lingvo' premiitaj en Svedio", la nomita revuo raportis en sia unua numero de 1987, ke filatelaĵoj de Song Ŝengtan, la ĝenerala sekretario de la Ĝjangsu-a Esperanto-Asocio, gajnis la kupran medalon en la monda ekspozicio de filatelaĵoj en Svedio. Interne de la kovrilo de tiu numero oni prezentis parton de liaj filatelaĵoj, liajn honorateston kaj medalon. La artikolo raportis ankaŭ pri la libro "Katalogo de Esperantaj Poŝtmarkoj"

Projektoj de memorigaj poŝtmarkoj por la centjariĝo de Esperanto





Samideanoj de la Ĝinĉang-a Scienc-teknika Esperanto-Asocio

redaktita de li por la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

ESPERANTA KURŜO EN LA TURISMA BUROO DE LJAŬNING-PROVINCO

Por adaptiĝi al la disvolviĝo de la turisma afero kaj trejni Esperantajn interpretistojn, la Turisma Buroo de Ljaŭning-provinco ekfunkciigis Esperantan kurson en la 15-a de aprilo. Ĉ. 40 diverslingvaj interpretistoj eklernis Esperanton.

SCIENC-TEKNIKA INSTITUTO DE ESPERANTO EN LA GANSU-A ESPERANTO-ASOCIO

Por apliki Esperanton en la scienc-teknika kampo kaj akceli la internacian scienc-teknikan interŝanĝon, la Gansu-a Esperanto-Asocio fondis sian scienc-teknikan instituton de Esperanto en la 15-a de februaro.

HELPU AL ZAIRO

S-ro Mafuila T. Mavomo informas, ke li funkciigas dumonatan

Esperanto-kurson en tri gravaj urboj de Zairo, nome Matadi, Boma kaj Inkisi-Kisantu. Por subteni kaj helpi ilian agadon li petas al ili sendi afiŝojn, franclingvajn broŝuretojn pri Esperanto, poŝvortaretojn, kuraĝigajn leterojn, financajn donacojn, Esperanto-muzikaĵojn (kaseto aŭ disko), E-revuojn, insignojn ktp. Adreso: S-ro Mafuila T. Mavomo, La Verda Stelo, B.P. 2, Kuilu-Ngongo (B.Z), Zairo.

ESPERANTO-AGADO EN JUGOSLAVIO

1. Fine de februaro ĉi-jare la ŝtata Pedagogia Instituto de Beogrado (Jugoslavio) komencis trimonatan Esperanto-seminaron por instruistoj de elementaj kaj mezgradaj lernejoj. La seminarion iniciatis la Lerneja Sekcio de Esperanto-Societo "Branko Rajŝiĉ" el Zemuno. La kurson gvidas filologo Momĉilo Oĉokoljiĉ, prezidanto de la Lerneja Sekcio, kaj profesoro doktoro Pribislav Marinoviĉ. La seminarion internaciigas inĝeniero Guan Kehua el Ĉinio kaj instruisto Giallo Boubakar el Malio.



Esperantistoj en ĉiunmonata kunveno en Kuilu-Ngongo, Zairo. S-ro Mafuila (la unua de dekstre) estas prezidanto de la Esp-klubo.




Esperanto seminario por instruistoj de la Ŝtata Pedagogia Instituto de Beogrado

2. En la lasta semajno de februaro ĉi-jare okazis sur la terenoj de la XIV vintraj Olimpiadoj en ĉirkaŭaĵo de Sarajevo (Jugoslavio) la 28-a Internacia Fervojista Ski-Semajno. Ĝin partoprenis 60 skiamantoj el naŭ landoj: Aŭstrio, Bulgario, Danlando, Ĉeĥoslovakio, Francio, Italio, Svislando, FR Germanio kaj Jugoslavio. Tiu sporta okazo fakte estis la unua internacia manifestacio en la jubilea jaro de Esperanto en Jugoslavio.

3. Ekde 1986 en la urbeto Ŝid en Jugoslavio laboras malgranda grupo de esperantistoj. Ili aranĝas ĉiumonate ekspozicion pri diversaj landoj pere de Esperantaĵoj en unu montrofenestro en la centro de la urbo. Ĝis nun estis prezentitaj: Ĉinio, Sovetunio, Svislando, Aŭstrio kaj Italio. Sekvos aliaj landoj.

4. De la 10-a de oktobro 1986 la Esperanto-redakcio estis fondita ĉe Radio Ŝid. Ili elsendas Esperantajn programojn sub la titolo "Amika Rondo" en la daŭro de 30 minutoj. La programoj inkluzivas informojn el E-movado, E-



Esperanto-redakcio en Radio Ŝid, Jugoslavio. S. Mitroviĉ (la unua de maldekstre) estas ĉefa redaktoro.

kurson por komencantoj kaj elektitan E-muzikon.

NOVA POPULARSCIENCA PERIODAĴO "FOKUSO"

La revuo "FOKUSO" estas nova nomo de INTERNACIA KOMPUTADO, eldonata de la Hungara Esperanto-Asocio. Ĝi prezentos al siaj legantoj artikolojn ne nur pri komputado, sed ankaŭ pri ekonomio sub speciala

rubriko prizorgata de la Ekonomikista Grupo de HEA kaj pri gravaj atingoj de la moderna naturscienco. La prezo de "FOKUSO" estas la sama kiel tiu de "INTERNACIA KOMPUTADO", t.e. 24 ned. guldenoj por kvar numeroj — unu jarkolekto. Oni povas aboni ĝin ĉe UEA. La adreso de la redakcio: Fokuso, Esperanto-centro, Budapeŝto, Pf. 193, H-1368.

□

Kanto-stelulo migranta inter kafejoj (Novelo)

(Unua Parto)

A

“... Giganta bolido kun diametro de 96.5-145 km. koliziis kun la terglobo en la interspaco de Pacifiko kaj Atlantiko, kaj sekve elŝprucis lafo interne de la terglobo kun tia forteco, al kiu neniel povas kompari sin tiu de Vezuvio. La lafo fluadis de norde suden, kaj post longa periodo da koaguliĝo aperis sur la terglobo la nuna Nord-Amëriko. . .”

“Kiel grandioza spektaklo! Se pruvigŭs la hipotezo pri la kolizio de la bolido kun la terglobo. . .”

“Se la hipotezo estus solida, se la mistera natura fenomeno antaŭ 3.8 miliardoj da jaroj estus pruvita, ĝi portus al la mondo ne nur surprizon sed ankaŭ novan teorion pri kontinenta origino, senkompate sturmante la tektonikon pri kontinenta floso cirkulintan pli ol cent jarojn kaj tiun pri plata kontinento.”

“Ĉu vere? Kiel interese. . . Kiel brava la homaro, kiel admirinda kaj respektinda ĝia senlaca konscia strebado!”

“Jes, kiam iu teorio gajnas sian lokon, iu alia nova jam brave debutas, jen la historio evoluas kaj perfektigŭs en tia drasta alterno.”

.....

La pordo mallaŭte fermiĝis, kvazaŭ ekrano interrompus ĉiajn bruojn. Ĉiŭ Jang staris sola en

neĝo, pene retenante la difuziĝantan agrablaĵon en la koro.

Li sentis bedaŭron kaj ĉagrenon ne pro tio, ke la varma atmosfero en la domo konstante tenis lin en ebrieta iluzio, sed pro tio, ke firme kaptis lin la rakonto pri la kolizio de la bolido. . .

Antaŭ momento, kiam li eliris kun sia gitaro, li vidis, ke ĉarma knabino kun stelitaj okuloj aŭskultas animskuan rakontadon de grizhara maljunulo.

Li estis absorbita de la rakonto pri la malproksima kaj trafa historieto. Li deziris sidi iom pli longe apud ili, ke daŭru ankoraŭ iom da tempo la plezuro subite leviĝinta en la koro. . .

Li rigardis la brakhorloĝon kaj faris kalkulon: De la kafejo “Ĝis” al la kafejo “Viola Rozo” kutime li biciklas 15 minutojn, sed nun en neĝado kvarono jam ne sufiĉas. Malgraŭ tio, li devis atingi tien je la naŭa, kaj nun ĉiu minuto estis valora.

Neĝis dense. La fiera urbo fariĝis nebula. La nokta foiro draste impresante per vigleco fermiĝis pli frue ol kutime. Ĉirkaŭe estis malmultaj pasantoj kaj veturiloj. En neĝo Ĉiŭ Jang biciklis rapide, kiel galopanta ĉevalo maljungita.

Antaŭ duonjaro, kiam direktoro Ĝang de la kafejo “Viola Rozo” diris al li “Vi venu”, frapetante sur lia ŝultro, li ĉagre-

niĝis, ke li estas iom tro alta, ke multaj devas levi la kapon por alparoli lin, kvankam ili ŝatas vidi flatemon sur alies vizaĝo kaj ne ŝatas levi la kapon por alparoli aliajn.

Frosta vento tranĉis ĝis ostoj. Kredeble la temperaturo jam antaŭ longe estis sub la nulo. Estis malagrabla bicikli en tia temperaturo, tiom pli ke li vestis sin ne multe kaj la nuda kolo elrigardis en la kolumo de la surtuto. La vento blovis tra la kolumo sur la bruston, kaj li etendis la manon por starigi la kolumon kaj blovis en ĝin varmon oblikvigante la kapon. La varma aero ŝvebis fume ĉirkaŭ la kolumo, karesis momenton la vizaĝon kaj kolon kaj difuziĝis. En palpebruma daŭro neĝflokaj, tranĉa vento kaj la varma elblovo intermiksiĝis nedisigeble.

“Ej, ej! Mi terure malpacientiĝas. Kial veni tiel malfrue?”

Ĉi-momente tre viglis la korpulenta direktoro Ĝang. Li faris paŝon antaŭen kaj kaptis Ĉiŭ Jang je la mano. Kaj la lasta vole nevole respondis per rideto.

“Viola Rozo” estas granda kafejo. La delikata dekoracio de la interna salono estis ĵaluze enviita de la mastroj de la ĉirkaŭaj malgrandaj kafejoj: Rondaj vitraj tabloj kovritaj per blankaj broditaj tukoj, seĝoj

tegitaj per kaŝtankoloraj ledoj, ĉio impresis elegante kaj impone. Kontraŭ la pordo estis nove instalita podio apenaŭ 3 metrojn larĝa kaj iom pli alta ol la planko. Sur la podio verve ludis kvinteto ĉirkaŭita de envazaj skarlataj eŭforbioj.

Ĉiŭ Jang demetis la surtuton, rule buligis kaj metis ĝin sur

apudan seĝon. Poste li ordigis sian kostumon rigardante sin sur la bruna vitrino.

“Amikoj,” ritme anoncis direktoro Ĝang, “ĝojiga informo: Nia ‘Viola Rozo’ havas la honoron inviti la ŝatatan junan kantiston Ĉiŭ Jang kanti por ni.

Pardonon, li venis en neĝo kaj devas iomete sin prepari. Nun

aŭskultu unue la muzikpecon ‘Blua Tango’, mi petas.”

Post sia anonco direktoro Ĝang haste paŝis al Ĉiŭ Jang por urĝi lin al la kanto: “Ĉu vi estas preta jam? Hodiaŭ vi savis min.”

Parolante direktoro Ĝang alŝovis laŭ la kontotablo slipon. Ĉiŭ Jang strabis al la slipo kaj trovis, ke ĝi estas la programo por la vespero. Kuntirante la brovojn, Ĉiŭ Jang kviete diris al Ĝang: “Direktoro, vi ja scias, ke mi estas kantisto migranta en pluraj lokoj. La ‘Viola Rozo’ estas jam la tria loko por mi ĉi-vespere, kaj nun vi postulas, ke mi kantu unu horon...”

“Oj, bedaŭrinde. Restas neniu rimedo krom ke vi ludos en la finalo. Ĉi-vespere la afero estos ekster la atendo, kaj vi helpu min kiel mia amiko. Rilate la rekompencan, ĝi certe kontentiga...”


Rigardante al la variema vizaĝo de direktoro Ĝang, Ĉiŭ amare ridetis en si, kaj pigre donis al li muziknotan kajeron dirante mallaŭte: “Kutima programo en kutima ordo. Hodiaŭ mi estas iom laca, kaj la orkestro ludu ne tiel laŭte.”

Direktoro Ĝang plurfoje diris “jes” kun klinita korpo, kaj poste sin turnis alien.

Rigardante al li la dorson, Ĉiŭ Jang aplombe fingre ludis la gitaron, kiu eligis obtuzan sonon...

Li fariĝis tro memfida kaj apatia. Sed antaŭ duonjaro li ne estis tia. Tiam li estis timida, kaj rideto ofte ludis sur liaj lipanguloj kun klara konturo.

“Ĉu vi,” malalta kaj korpulenta direktoro Ĝang rigardis lin de malproksime kaj daŭrigis sian parolon post longa paŭzo, “kantas kun gitarludo aŭ danco?”



“Tute laŭ via postulo”,
respondis li mallaŭte.

“Kompreneble, nun plaĉas
kanto kun danco. Por kanti en
la ‘Viola Rozo’, oni unue devas
kapabli almenaŭ iel saltadi. Nu,
vi provu.”

Li ekkantis sentime. Lia voĉo
ne perdis purecon pro streĉiteco,
la gestoj ne estis malpli elegantaj
ol kutime, kaj direktoro Ĝang ne
estis tiel ruza kiel en imago.

“Kie vi kantis iam?” demandis
lin direktoro Ĝang post longa
silento.

“Li estas novico,” anstataŭ li
respondis grandokula instruisto
de la kultura domo. Li esperis,
ke Ĉiŭ Jang sukcesos.

Direktoro Ĝang diris al Ĉiŭ:
“Mi devas anticipi bone klarigi
al vi, ke la ‘Viola Rozo’ estas
malsama ol la aliaj kafejoj, ĝi
postulas pli da arteco.” Post tio
li flustris kun la grandokula
instruisto, alte levis la brakon
kaj frapetis al Ĉiŭ sur la ŝultro:
“Konsentite jam.”

Elirinte el la ‘Viola Rozo’, li
demandis al la instruisto, kion la
direktoro flustris kun li.

“Direktoro Ĝang aprecas vian
tembron kaj vian sensivecon por
la muziko. Kredeble li interesi-
ĝas pri vi. Tamen li montras mal-
kontenton pri via kontrakto kun
du kafejoj. Li esperas, ke vi
nuligos kontrakton kun unu el
ili.”

Ĉiŭ Jang haltis kaj post mal-
longa medito mallaŭte diris:
“Ne.”

Ĉiŭ Jang faris grandan paŝon
antaŭen. La lumo radiis rekte
al lia vizaĝo. Ĉio antaŭ la okuloj
nebuliĝis en la buntaj lumringoj.

“Saluton, amikoj. Mi nomiĝas
Ĉiŭ Jang. Nun mi kantos por vi.



Mi esperas, ke mia kanto plaĉos
al vi. Dankon.”

Post la ŝablona antaŭparolo li
diris kun iom altigita voĉo:
“Unue mi kantu por vi kanton
en tipa diska ritmo...”

La preludo, kiel subita ek-
kriego, superis lian voĉon kaj
batis nenifaremon kaŭzitan de la
fresta nokto. La nebuligitaj
pupiloj en la halo subite eklumis
per perla brilo. La aŭskultantoj
retenis la spiron, fiksas rigardon
sur tiu junulo intencanta liberigi
sin de la nuna tempo kaj spaco.

Subite li levis la kapon, la
fruntaj haroj forte hirtiĝis, kaj
la okuloj glime brilis. Tuj ĉe tio

kantado elbuŝiĝis kaj kunportis
klare videblan impulson.

Vulkane pasia, senkatena,
klara kaj iom konvulsia ritmo
similas al ŝprucanta fonto, al
galopanta sovaĝa ĉevalo ne-
dresebla. La aŭskultantoj en la
halo senescepte spertis la eks-
plodon de la sono, ĝian streĉiĝon,
lantiĝon kaj difuziĝon... □

* La aŭtoro (1955-) komen-
cis verki en 1985. Liaj ĉefaj ver-
koj estas “Malaperinta Albert”,
“Sendorma Nokto sub la Duon-
luno” kaj aliaj noveloj.

(Daŭrigota)
Esperantigis ŬANG ŜIJONG

Sep personuloj de Ĝjan'an-erao kaj sep bambuaraj famuloj

de MEJ ĜI

Krom Caŭ Caŭ kaj liaj filoj, la famaj el la Ĝjan'an-aj verkistoj estas Kong Ĵong, Ŭang Can, Liŭ Ĝen, Ĵuan Ju, Ĉen Lin, Jing Jang kaj Ŝju Gan. En la literatura historio oni kutime nomas ilin Sep Ĝjan'an-aj Personuloj. El ili la plej aĝa estis Kong Ĵong. Li estis kortegano de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.) kaj kontraŭis al Caŭ Caŭ en politiko. La aliaj ses homoj sin submetis al Caŭ Caŭ. Ili travivis la tumultajn jarojn en la lasta periodo de la Orienta Han-dinastio kaj havis malfeliĉan travivaĵon. Submetiĝinte al Caŭ Caŭ, la ses homoj deziris plenumi ambicion. Pro tio iliaj literaturaj verkoj plejparte priskribas militon kaj ilian travivaĵon kaj enkorpiĝis la tipajn trajtojn de la Ĝjan'an-a literaturo. Krome, ili faris literaturan aktivadon ĉirkaŭ Caŭ Caŭ kaj tiel donis certan kontribuon al la prosperiĝo de la Ĝjan'an-a literaturo kaj la disvolviĝo de la poemoj kun kvin-ideogramaj versoj. Sed el iliaj verkoj nun legiĝas malmulte.

El la sep personuloj Ŭang Can (177-217 p.K.), la plej talenta, estas honorita kiel "laŭroj de la sep personuloj". Lia ĉefverko "*Sep Malĝojoj*" spegulas militan haoson en la lasta periodo de la Orienta Han-dinastio. La poemo priskribas liajn travivaĵojn en eskapo el milita tumulto, spiras tragike du versoj el ĝi:

*Kion mi ja vidis ekster domoj?
Ĉie kuŝas ostoj de la homoj.*

El la poemo la plej kortuŝa estas priskribo pri malsatega virino, kiu forlasis sian filon:

*Vojflanken virino malsata,
La bebon plorantan forlasas.
Aŭdante la ploron korŝiran,
Kun larmoj ŝi sola foriras.*

En la militaj jaroj patrino eĉ ne povis prizorgi sian filon. Kia korŝira sceno! La kompatado de la poeto al la popolo kaj lia granda indigno kontraŭ la milito klare montriĝas en lia akuzado.

La *fu*-o "Ascendo de Urboturo" de Ŭang Can estas majstra mallonga lirika *fu*-o. Ĝi verkiĝis je lia ascendo de urboturo, kiam li rifuĝis en Ĝingĝou (en la nuna Hubej-provinco). La *fu*-o priskribas la ĉarman ekzotan pejzaĝon vidi-

tan de li de sur la urboturo kaj lian nostalgion, kaj poste la militon kaj lian nerealigeblan aspiron. La verko estas sincera kaj kortuŝa, kombinate pejzaĝon kaj lirikon. Ĝia stilo, klara kaj flua, havas grandan influon al la disvolviĝo de la postaj lirikaj *fu*-oj.

Liŭ Ĝen (170-217 p.K.), fama same kiel Ŭang Can, estis lerta en poezio. Tri poemoj "Al Mia Kuzo" estas liaj ĉefverkoj, kiuj esprimas la aspiron kaj inklinon de la aŭtoro. En la dua poemo li simboligas siajn aspiron kaj karakteron per pino kaj esprimas, ke li tenos sian karakteron en ĉia ajn situacio kaj ne submetiĝos al feroca forto. Ankaŭ liaj aliaj poemoj montras lian aspiron kontribui al la nacio, kio estas la komuna spirito de la Ĝjan'an-aj verkistoj.

Nun videblas tre malmultaj verkoj de la aliaj kvin verkistoj. El iuj revuoj kaj malmultaj verkoj postlasitaj de ili oni informiĝas pri fundamentaj faktoj de ili. Inter ili Kong Ĵong estis kompare elstara verkisto. Li, justa kaj rigida, ne flatis al potenculoj nek timis potencan forton. Li plurfoje kritikis kaj eĉ mokis politikojn de Caŭ Caŭ kaj fine estis mortigita de la lasta. Liaj verkoj ĉefe estas eseoj akraj, humuraj kaj pompaj. Jing Jang kaj Ŝju Gan havis malpli altan atingon en literaturo ol la aliaj. Ĉen Lin kaj Ĵuan Ju famas pro siaj artikoloj, precipe la praktikaj. La poemo de Ĉen Lin "Trinkiĝi ĉevalojn ĉe la Granda Muro" estas ofte menciata en la literatura historio. Per la historia fakto de konstruado de la Granda Muro en Ĉin-dinastio (221-206 a.K.), ĝi malkaŝas la kruelecon de la servuta sistemo.

*Etendas sin la longa Granda Muro
Eosto-okcidenten tri mil li-ojn.*

La Granda Muro signifas senfinan servuton. Sub la peza laboro aperas jena fenomeno:

*Servutas junaj viroj ĉe l' landlimo,
Sopiras hejme iliaj edzinoj.*

Unu longe servutanta viro, certiĝinta, ke li ne povos hejmen reveni vive, kun larmoj admonis sian edzinon:

*Ne restu hejme, sed reedziniĝu,
Kaj bone traktu l' novajn bogepatrojn,
Sed ne forgesu l' edzon ekziĝintan.*

Lia edzino respondas:

*Post l' edziniĝo vin mi ĉiam sekvas,
Kroĉiĝas al vi la sopira koro.
Amaras certe l' vivo ĉe l' landlimo,
Ne povos longe vivi mi en solo.*

La fatalaĵo suferita de la bonkora geedza paro evidente kaŭziĝis de la despota regado.

Post Ĝjan'an-erao, en la periodo de la lastaj jaroj de Ŭej-dinastio (220-265 p.K.) ĝis Ĝin-dinastio (265-420 p.K.) la interna konflikto en la reganta klaso fariĝis pli kaj pli akra. Sub la malluma regado la intelektuloj neniel povis disvolvi sian talenton kaj sin turnis adore al filozofio de nenifarado pledita de la antikvaj filozofoj Laŭzi kaj Ĝuangzi, tiel ekfuroris inter ili babili mistikismon, konduiti ekstravagance kaj ne zorgi pri la reala vivo. En ilia literatura verkado ankaŭ montriĝas serioza nihilisma penso. Ĝuste en tia situacio aktivadis la sep bambuaraj famuloj Ĝji

Kang, Ĵuan Ĝji, Ŝan Taŭ, Ŝjang Siŭ, Ĵuan Ŝjan, Ŭang Ĵong kaj Liŭ Ling. Ili vivis amike kaj ekskursis en bambuaroj. Fakte inter ili nur Ĵuan Ĝji kaj Ĝji Kang estis la plej elstaraj kaj influhavaj. Ili ambaŭ, kvankam influitaj de la epoka furoro, prezentis per kaŝa esprimo siajn hezitemon kaj deprimon kaj malkontenton pri la reala vivo. Iliaj verkoj fundamente heredis la Ĝjan'an-an stilon.

Ĵuan Ĝji (210-263 p. K.) ŝatis verki poemojn kaj ambiciis savi la popolon jam en siaj fruaj jaroj. Poste li sin turnis al pasiva rezisto, kaj ĉiutage drinkis kaj dormis, neglektante la sociajn aferojn. Sed fakte, malgraŭ sia ekstravaganca konduto, li estis aflikta. Liaj ĉagreno kaj indigno prezentiĝas malklare en liaj 82 famaj "Aspir-esprimaj Poemoj". Ili estis verkitaj ne en sama tempo kaj vere prezentas la komplikajn penson kaj senton de Ĵuan Ĝji dum lia tuta vivo.

En la 39-a poemo de liaj "Aspir-esprimaj Poemoj" la poeto malkaŝis sian ambicion:

*"Brava viro havas ardan volon,
Tra la lando savi la popolon."*



kaj fidelecon:

*"Fidelo markas senkomparan gloron,
Bona nomo famas ja pro justo."*

Lia ekstravaganca konduto efektive rezultis el lia tiama situacio kaj afliktis lin multe. Tiu psikolo de la poeto montriĝas en la poemo "Nokto Sendorma":

*Mi ne povas dormi en la nokto,
Ellitiĝas ludi mi sepkordon.
Kulvualon nun la luno lumas,
Milda vento mian veston ludas.
En kamparo vokas solansero,
Birdo en arbaro krias eĥon.
Vagadas mi, sed nenion vidas,
En soleco triste mi suspiras.*

Lia poemo "Sub Bonaj Arboj Aperis Pado" per metaforoj figure prezentas la prosperon kaj disfalon de Ŭej-reĝimo. La malordo de la kortega regado deprimis lin kaj ne vidigis al li perspektivon, rezulte de tio li ermitiĝis. Iuj el liaj poemoj ankaŭ malkaŝas la pli kaj pli putriĝintajn regantojn de Ŭej-regno kaj montras lian progresan penson. En la poemo "Ekveturo de la Ĉefurbo de Ŭej-regno", uzante paseon por aludi la nunon, li kuraĝe montris, ke la putriĝo de la regantoj nepre kondukos ilian regadon al pereco. Krome, "Biografio de Grandsinjoro" de Ĵuan Ĝji estas valora prozo. Kvankam la grandsinjora figuro estas fikcia kaj la verko tendencas konduki legantojn de la realo, tamen ĝiaj kritiko kaj malkaŝo de la feŭda socio estas akraj.

Ĝji Kang (223-263 p. K.) naskiĝis en malriĉa familio kaj estis boparenco de la imperiestra familio de Ŭej-regno. Li adoris Laŭzi kaj Ĝuangzi, emas al kvieto kaj senfaro. Tamen li malamegis ĉian malbonaĵon, estis elmontriĝema en la reala vivo kaj fine estis mortigita pro tio. Liaj poemoj ĝenerale konsistas el kvar-ideogramaj versoj kaj prezentas gracian stilon kaj noblan psikon. Ekz. lia "Poemo por Drinka Kunveno" tekstas:

*Rivera fluo verda, lanta,
Glitetas malproksimen.
En mezo de l' rivero granda
Boato stagne flosas.
Zefiro milda sible blovas,
Remilon tre senhaste movas.
Pasigi tempon en vojaĝo,
Kun ĝojo, ĝis la olda aĝo.*

Liaj "Poemoj de Enkora Indigno" prezentas lian senton ne sekvi vulgaran modon kaj fieri je sia nobleco. Vidiĝas ĉie per laj versoj en liaj poemoj. Jen ekzemploj:

*Florigas arbojn primavero,
Folioj servas kiel ombrelo.
Susure blovas la zefiro,
En blovo zumas mia liro.*

*Rigardi al sovaĝanseroj,
Ludadi kvinkordon libere,
Sen zorgo pri ĉiaj aĵeroj,
L' animo migradas ĉiele.* □

(Daŭrigo de p. 20)

hom-figurojn, kiaj historiaj personuloj, belulinoj en antikva vesto, dioj kaj budhoj en mitoj. La ŝanhajaj jadaĵoj ujoj kun antikva gusto estas la plej famaj. La braceletoj, ringoj, orependaĵoj kaj aliaj ornamaĵoj produktitaj en Kantono estas famaj tra la mondo.

Pro alta malmoleco de jado la skulptistoj devas ĝin tranĉi, ĉizi, fajli kaj poluri anstataŭ griferi kaj modli dum prilaborado. Jado estas rara, multekosta kaj ĉiu peco havas sian proprecon, tial oni devas prilabori ĝin laŭ la kvalito kaj koloro. Oni povas diri, ke ĉiu fama jadaĵo montras

la altan teknikon kaj multan laboron de la metiartistoj. Ekzemple, el la pekinaj jadaĵoj estas artaĵo el agato kun akvo ene. La skulptisto lerte konservis en sia verko la vezikon, kiu formiĝis antaŭ milionoj da jaroj. La pli-ol-70-jara majstro Ĝou Ŝouhaj en Ŝanhajo, dank' al sia eksterordinara skulpturo, faris el jada peco 16 centimetrojn alta "Jadan Parfumujon kun Penda Ĉeno" kun totala alto de 50 centimetroj kaj sen ia rompiĝo de la ĉeneroj post zorgema projekto kaj per originala metodo de prilaboro.

La plej impona el la nunaj jadaĵoj estas la senprecedence

granda jadaĵo "Ses-banjana Pagodo". Ĝi estas farita de la Suda Jadskulptejo, Kantono, el granda jaspo dekkelkajn tunojn peza. La verda naŭetaĝa pagodo, belaj kioskoj kaj templo, delikataj ventosonoriloj, pendaj ĉenoj kaj balustradoj ĉiuj estas aĵure skulptitaj kaj versimilaj. La cent budhaj statuoj ĉiuj mienas malsame. Ĝuante la belajn pejzaĝojn kaj elvokivajn figurojn, oni sentas sin kvazaŭ en budhisma elizeo, kie parfumas incens-fumo. La artaĵo, enkorpigante la saĝon de la skulptistoj, montras en la bela aspekto kaj perfekta arto la vivecon de la antikva ĉina jada skulpturo. □

El la verkoj de sep personuloj de Ĝjan'an-erao
kaj sep bambuaraj famuloj

LIŬ ĜEN (?-217) :

Al mia kuzo (2)



*Surmonte pinoj pozas en belstaro,
susure sonas vento en la valo.
Kiel potencas bruo de l' ventblovo,
kiel fortikas pina la branĉaro!*

*Malgraŭ glaci' kaj prujno en severo,
tutjare l' pinoj staras en fiero.
Kial do ili ne frostmalsaniĝas?
Pro propra la natura karaktero.*

JŬAN ĜJI (210-263):


Sub bonaj arboj aperis pado



*Sub bonaj arboj de persik' kaj pruno,
en l' orientĝarden' aperis pado.
Foliojn pelas vento de aŭtuno,
de tio komenciĝas la velkado.
Al prosperec' okazos certe ĝalo,
kaj dome kreskos veproj en l' estonto.
Forlasu ĝin rajdante sur ĉevalo,
al la ermita Okcidenta Monto*.
Se vi ne povas doni al vi helpojn,
do kiel al l' edzin' kaj l' infanaro?
Jen prujno kovras jam la sovaĝherbojn —
alvenas jam la fino de la jaro.*

Elĉinigis LAŬLUM

* Tio estas Ŝoŭjang-monto, kie vivis ermite antikvaj lojaluloj Bo Ji kaj Ŝu Cji, kiu ne volis akcepti la regadon de nova regnestro.



eldonata de la Ĉina Esperanto-Eldonejo konigas al vi Ĉinion ĝenerale. La unua libro de tiu ĉi serio aperis en 1984, kaj jam 7 libroj publikiĝis ĝis nun, nome:

40 Vidindaj Loko en Ĉinio (12-Es-1825P) £ 1,90 US\$ 3,90

Gvidlibro pri 40 plej famaj pitoreskejoj en Ĉinio. Krom la priskriboj pri la pejzaĝoj vi legos ankaŭ interesajn legendojn kaj popolarakontojn pri tiuj lokoj. Kun koloraj bildoj kaj ilustraĵoj.

Mia Vivo (17-Es-1884P) £ 0,80 US\$ 1,70
La libro rakontas al vi, kiel vivas kaj laboras ĉinoj el diversaj socitavoloj, inter kiuj troviĝas laboristo, kamparano, advokato, arkeologo, dancistino, lamao kaj eĉ frato de la lasta imperiestro de Ĉinio. Kun bildoj.

Dek Ses Urboj de Ĉinio (17-Es-1885P) £ 1,90 US\$ 3,90

La ĝenerala skizo pri la historio, ekonomia konstruado, kulturo kaj eduko k. a. de 16 ĉinaj grandaj urboj. Kun koloraj kaj nigra-blankaj bildoj.

Kuracaj Manĝaĵoj (15-Es-2047P) £ 0,65 US\$ 1,25

Estas rekomendataj al vi 87 receptoj de kuracaj kaj sanigaj trinkaĵoj, konfitaĵoj, pladoj k. a. Ĉe la fino troviĝas 3 apendicoj: Pri efikoj de ingredientoj de la kuracaj manĝaĵoj, Tabelo pri ĉefaj nutroelementoj bezonataj de la homa korpo kaj Nutra-

ĵoj taŭgaj kaj netaŭgaj por pacientoj. Kun koloraj bildoj.

Ĉinaj Familiaj Pladoj (15-Es-2061P) £ 1,10 US\$ 2,15

Enhavante 86 ĉinajn pladojn. Plejparto el ili estas ne nur nutraj, belkoloraj, bonodoraj kaj bongustaj sed ankaŭ malkaraj kaj facile prepareblaj. La libro detale klarigas la preparadon de la pladoj, ĝi multe helpas al tiuj, kiuj interesiĝas pri la ĉina kuirarto. Kun koloraj bildoj.

Tajĝiĉĵuan (17-Es-2065P) £ 1,30 US\$ 2,50
Tajĝiĉĵuan estas unu el la specoj de la ĉina luktarto, saniga gimnastiko. Krom plifortigi korpon, ĝi ankaŭ donas tre bonan efikon por kuraci hipertension, ulceron, kormalsanon, ftizon kaj aliajn kronikajn malsanojn. Kun klarigo kaj bildoj por ĉiu teniĝo.

Gvidlibro pri Pekino (12-Es-2067P) £ 1,55 US\$ 2,85

Ĝi servas kiel helpanto al eksterlandaj gastoj en vizito al Pekino, konigante vidindajn lokojn, hotelojn, restoraciojn, trafikajn liniojn, gravajn telefonnumerojn, metiartaĵojn kaj lokajn produktaĵojn ktp. Kun mapo kaj koloraj bildoj.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA, Perantoj de EPC aŭ Internacia Libro-komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Hani-aj knabinoj en ornamitaj ĉapoj

TRA NIA LENS

Bulang-a virino kun arĝentaj orependaĵoj

Ĉarmaj ornamaĵoj

Fotoj de LIŬ SIGONG

En la provinco Junnan, sudokcidenta Ĉinio, vivas 22 nacimallimultoj, kiel taj-oj, hani-oj kaj bulang-oj, kaj portas siajn tradiciajn ornamaĵojn. Tie la vizitantoj sentas sin kvazaŭ en legenda mondo.

Malsamaj naciecoj portas malsamajn ornamaĵojn, kiel arĝentaj ĉenoj, rondaj arĝentaj pecoj, arĝentaj globetoj kaj vitraj bidoj. Iuj naciecoj ŝatas kapornamojn, aliaj brustornamojn kaj triaj ornamaĵojn de la kapo ĝis la piedoj. Hani-aj virinoj faras el nigra aŭ blua nankeno diversspecajn ĉapojn kaj aldonas al ili arĝentajn globetojn, rondajn arĝentajn pecojn kaj vitrajn bidojn aŭ silkajn galanteriojn. Bulang-aj virinoj ŝatas porti arĝentajn orependaĵojn 50 gramojn pezajn. Ĝingpo-aj virinoj ŝatas porti ŝalon ornamitan per arĝentaj globetoj kaj ĉenoj, similan al antikva kasko. Taj-aj virinoj tre atentigas sian hararanĝon ornamitan per floroj.






Hani-aj knabinoj en festa kostumo

Hararanĝo de taj-a knabino



*Hani-a virino kun belaj kap- kaj brustorna-
moj*





Gingpo-aj virinoj kun belaj vestornamoj



En fabriko de vestoj por nacimalplimulto

Hani-aj knabinoj surstrate






Vazoj


Telero

Potoj



LI ĈJANG:

Trezora porcelanaĵo el Ĝjun-bakujo



Glazurado de Ĝjun-porcelanaĵoj

La antikveca ĝjun-porcelanaĵo eleganta kaj bunte kolora estas honorita kiel trezoro el la porcelanaĵoj. Lastatempe mi vizitis la produktejon de ĝjun-porcelanaĵoj, Ŝenhoŭ-urbeton de Juŝjan-gubernio, Henan-provinco, kaj pli multe sciis pri la ĉarma ĝjun-porcelanaĵo.

Legendo diras, ke aktivadis tie la fama antikva ĉina klanestro Ju kaj estis Ĝjun-teraso memore al li. Ŝenhoŭ-urbeto situas proksime de Ĝjun-teraso, sekve tieaj bakfornoj por porcelanaĵoj estas nomitaj ĝjun-bakfornoj kaj iliaj produktaĵoj ĝjun-porcelanaĵoj kaj la malgranda Ŝenhoŭ-urbeto Ĝjun-urbeto.

Ŝenhoŭ-urbeto sin trovas en valo nemalproksime okcidente de la Juŝjan-gubernia urbo. Enirinte la malgrandan urbeton, mi kvazaŭ venis en porcelanaĵan mondon. Longa strato, kiel la ĉefa strato de la urbeto, etendiĝas laŭlonge de la valo. Preskaŭ ĉiuj familioj ambaŭflanke de la strato komercas per porcelanaĵo. Ili havas vendostandojn antaŭ siaj domoj. Oni povas vidi tra la pordoj kaj fenestroj malfermitaj diversajn porcelanaĵojn en la

ĉambroj. Mi informiĝis de iu mastro, ke ĝjun-porcelanaĵoj de Ŝenhoŭ-urbeto altiras al si komercistojn kaj produktantojn de porcelanaĵoj venintaj el diversaj lokoj de la lando, ili alportas diverslokajn produktaĵojn, sekve, la urbeto fariĝis prospera komercejo de porcelanaĵoj.

Inter la multnombraj fabrikoj de Ĝjun-porcelanaĵoj en Ŝenhoŭ la plej elstara estas la Dua Fabriko de Porcelanaĵoj de Juŝjan-gubernio. La fabrikestro Ĝang Tuŝan, kiu gvidis la fabrikon en ĝia konstruado en la mezperiodo de la 50-aj jaroj, okupiĝas pri la ĝjun-porcelanaĵa produktado jam pli ol 30 jarojn. Li estas specialisto tiuflanke. Ĝang kaj la vicfabrikestro Ŭang Ĉunŝiŭ akompanis min viziti la metiejojn kaj konigis al mi la historion pri ĝjun-porcelanaĵo.

Ĝang diris al mi, ke la porcelanaĵo estas granda invento de la antikvaj ĉinaj laboruloj. Ĝia historio originis el Tang-dinastio (618-907 p.K.), sed tiam la ĝjun-porcelanaĵo ne portis originalan stilon. En Song-dinastio (960-1279 p.K.), anstataŭ la tradicia glazurado, oni uzis kupran oksidon kiel kolorilon kaj sukcese

bakis kupre ruĝan glazuron. Inter la blue glazuritaj porcelanaĵoj ĝjun-porcelanaĵo distingiĝas per ruĝo eliĝinta sur la blua fono. Kiel rozkolora nubo sur la blua ĉielo, ĝi okupis la unuan lokon en la kvin famaj bakfornoj (Ĝjun-, Ju-, Ĝuan-, Ge- kaj Ding-bakfornoj) de Song-dinastio. Imperiestro de Song-dinastio Ĝaŭ Ĝji (1100-1125 sur la trono) difinis, ke la raraj ĝjun-porcelanaĵoj estu uzataj nur por la imperiestra palaco. Ekde tiam la ĝjun-porcelanaĵo vaste famiĝis. La postaj dinastioj honoris ĝin kiel trezoran porcelanaĵon. En 1126 la ĉefurbo de Song-dinastio translokiĝis suden, kaj la produktado de ĝjun-porcelanaĵoj detruigis en milito. La tradicia ĝjun-porcelanaĵo de Song-dinastio fariĝis netaksebla trezoro. Cirkulis diroj, ke "oro estas taksebla, sed ĝjun-porcelanaĵo ne", "multa riĉaĵo valoras malpli ol unu ĝjun-porcelanaĵo". Poste iuj provis produkti ĝjun-porcelanaĵojn, sed la kvalito estis multe malpli bona ol la antaŭa.

En 1955 la registaro revenigis formigrintajn metiartistojn kaj organizis ilin kolekti materialojn pri la ĝjun-porcelanaĵa teknolo-

gio, esplori historiajn materialojn kaj prifosi ruinojn de ĝjun-bakformoj. Sub la helpo de ceramikaj fakuloj oni provproduktis ĝjun-porcelanaĵojn kaj fine faris la faman porcelanaĵon, kies teknologio perdiĝis pli ol 600 jarojn, denove brilradia. Nun la Dua Fabriko de Porcelanaĵoj akiris multajn novajn sukcesojn surbaze de la tradicia teknologio, la kvalito de produktaĵoj superis la plej altan nivelon en la historio.

En la fabriko mi rigardis la procedojn de modlado, glazurado kaj bakado. Por fari eĉ malgrandan florvazon el kaolino necesas 72 procedoj.

La valoro de ĝjun-porcelanaĵo kuŝas en enbakforna variigo. Montrante ĵus elbakitajn produktaĵojn, la vicfabrikesto Ŭang Ĉunŝiŭ diris: "Rigardu, kvankam ili estas forme samaj kaj faritaj el sama kaolino, tegitaj per samspeca glazuro kaj bakitaj en sama bakforno, tamen ili estas kolore malsamaj. Tio rezultis el enbakforna variigo." Laŭdire, la enbakfornan variigon influas ne nur la materialoj, hejtaĵo, glazuro kaj temperaturo en bakforno, sed ankaŭ la sezonoj, klimato kaj vento-direkto, kaj eĉ la pozicio de muldaĵoj en la bakforno. La koloroj kaj desegnoj por la alispecaj porcelanaĵoj estas neniom ŝanĝitaj post bakado. La koloraj muldaĵoj de ĝjun-porcelanaĵo portas bunton post bakado. Elbakiĝinte, iuj ĝjun-porcelanaĵoj eble estas aŭ ordinaraĵoj, aŭ senutilaj aŭ trezoroj kun aparta artefiko neatendita. Eĉ la produktantoj ankaŭ surpriziĝas kaj ĝojegas pro tia neatenditeco.

En Ŝenhoŭ-urbeto cirkulas jena legendo: Antaŭ tre tre longe iu virino majstranta en bakado produktis brile radiantan belegan vinujon. Prefekto prezentis ĝin al la imperiestro, tiu ĝin tre ŝatis

kaj ordonis, ke ŝi elbaku unu saman vinujon en limigita tempo, alie, ŝi estos senkapigita. Ŝi bakis plurfoje, sed malsukcesis. Proksimiĝis la templimo, ŝi trovis neniun rimedon kaj saltis en la fajron de bakforno. Neatendite, tiufoje elbakiĝis des pli ĉarma porcelanaĵo. Ricevinte ĝin, la imperiestro ekkomprenis, ke pro la enbakforna variigo oni ne povas elbaki la saman paron da ĝjun-porcelanaĵoj kaj titolis la virinon Sankta Patrino de Ora Flamo. Antaŭe la bakistoj de Ŝenhoŭ-urbeto kultis ŝin kiel diinon de bakforno. Ĉiufoje antaŭ la bakado ili preĝis al ŝi kun la espero, ke la bakforno donos pli multajn kaj pli mirindajn porcelanaĵojn.

Pro la neantaŭvidebla enbakforna variigo kaj la malfacile regeblaj naturaj kondiĉoj en bakado de la ĝjun-porcelanaĵo, la procentaĵo de normaj produktaĵoj estis tre malgranda. Antaŭe estis diro: "Malsukcesas naŭ el dek fojoj de la bakado." Nun la Dua Fabriko de Porcelanaĵoj senĉese akumulas spertojn en la produktado, resume trovis kompare sciencajn metodojn de bakado, la procentaĵo de normaj produktaĵoj jam atingis 40%. Estas tre malfacile produkti raran porcelanaĵon neatenditan.

Fine mi vizitis la eksponejon de produktaĵoj. Tie eksponiĝis centoj da valoraj porcelanaĵoj. Kiam mi eniris la eksponejon mi estis ravita de du grandaj ĝjun-porcelanaj vazoj altaj 1.5 metrojn, kun granda ventro kaj funelforma aperturo sur la longa kaj maldika kolo. Ambaŭflanke de la kolo estas po unu viveca drako, ĉirkaŭ kies kolo ornamiĝas ringeto, kiu ektintas ĉe tuŝeto. Ĝang diris, ke estas tre malfacile baki grandan ĝjun-porcelanaĵon, kaj antaŭe cirkulis

la diro, ke la grandeco de ĝjun-porcelanaĵo ne superas 1/3 metron. Ĝis nun oni produktis nur 8 tiel grandajn porcelanaĵojn.

Tie eksponiĝis diversaj tradiciaj artaj porcelanaĵoj, kiaj boteloj, vinujoj, incensujoj, tripedoj, peniklavujoj, kaj ankaŭ novaj produktaĵoj, kiaj florvazoj, skribiloj kaj modeloj de birdoj kaj bestoj. Ili estas brilkoloraj kaj havas belan aspekton kun ruĝo kaj purpuro kiel la bazaj koloroj. Tamen la ruĝo varias inter koloroj karmezina, cinabra, skarлата, karmina kaj fajre ruĝa, kaj la purpuro inter koloroj roze purpura, vinbere purpura, melongene purpura. Fakte, tiuj porcelanaĵoj havas diversajn kolorojn miksitaĵojn: Purpuro vidiĝas en ruĝo, bluo en purpuro, blanko en bluo kaj ruĝo en blanko, la brilaj koloroj kvazaŭ variantaj nuboj portis al la rigardantoj raven de beleco.

Se en la diafana glazuro troviĝas vejnoj similaj al fraĵo, krabopiedoj, lumbrikaj irspuroj aŭ perlaĵ punktoj, la porcelanaĵo estas rigardata kiel supera raraĵo malfacile akirebla. Precipe la fraĵosimilaj vejnoj reflektas en la suno biuan laktlumon, impresante tridimensie. La vejnoj similaj al lumbrikaj irspuroj kaŝiĝas sub la glazuro, estas videblaj sed nepalpeblaj. Tio estas unu el la trajtoj de ĝjun-porcelanaĵo. Iuj eksponaĵoj surhavas eĉ pli mirindajn naturajn kaj versimilajn bildojn.

En la vendejo de la fabriko ni renkontis nemalmultajn aĉetistojn el aliaj provincoj kaj municipoj. Laŭdire, iliaj metiartaj porcelanaĵoj de kelkdek specoj estas menditaj de pli ol 30 landoj kaj regionoj, inkluzive Japanion, FR Germanion, Italion kaj Usonon, kaj la mendokvanto kreskas jaron post jaro. □

La maroj de Ĉinio

de LAN SAN

Ĉinio oriente kaj sude najbaras al maroj, kiuj estas nomataj laŭ la geografia situo Bohaj-marano, Flava Maro, Orienta Ĉina Maro kaj Suda Ĉina Maro. La tri antaŭaj situas oriente de la ĉeŝtero kaj la lasta sude de ĝi. Ili estas maroj okcidente de Pacifiko limtuŝantaj la orientazian kontinenton, oriente najbaras al Koreio, Kjuŝu-insulo kaj Rjukju-insularo de Japanio, sude al Filipinoj kaj Kalimantanano.


La plej norda Bohaj-marano estas interna maro de Ĉinio, brakumata de la ĉeŝtero de Ĉinio. Sude kaj norde de ĝia buŝo kuŝas la duoninsuloj Ŝandong kaj Ljaŭdong, kiuj kiel pinĉiloj ĉirkaŭas la maron. Inter ili sterniĝas Bohaj-markolo. Mjaŭdaŭ-insularo dislokiĝas en la golfo. Ĝi kiel la pordo de Bohaj-marano regas la trapasejojn de Bohaj-marano kaj la Flava Maro. Oriente

de Bohaj-markolo estas la Flava Maro, kiu etendiĝas norde ĝis la buŝo de Jalu-rivero, sude ĝis la norda bordo de la buŝo de Jangzi-rivero kaj ĝis la insulo Ĉeĝudo de Koreio. Sude de la Flava Maro estas la Orienta Ĉina Maro, kiu etendiĝas sude ĝis la promontoro Ĝenhaj de Ŝjamen-golfo, Fuĝjan-provinco kaj oriente ĝis Kjuŝu-insulo kaj Rjukju-insularo de Japanio. La Suda Ĉina Maro norde limtuŝas la Orientan Ĉinan Maron kaj sude la proksiman maron de Zengmurifoj. Pere de Baŝi-markolo, Sulu-marano, Javo-marano kaj Malako-markolo, ĝi interligiĝas kun Pacifiko kaj la Hinda Oceano. Ĝi estas la unika trapasejo de la surmara trafiko inter Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj kaj Oceanio, Afriko kaj Eŭropo. La kvar maroj interligiĝas kaj ĉirkaŭas la orientan kaj sudan partojn de la ĉina ĉeŝtero.

En la vasta marareo de Ĉinio dislokiĝas pli ol 5 000 grandaj kaj malgrandaj insuloj, el kiuj la plej granda estas Taj'ŭan kaj post ĝi Hajnan. En la Suda Ĉina Maro estas la insularoj Dongŝa oriente, Ŝjiŝa okcidente, Ĝongŝa meze kaj Nanŝa sude, kies Zengmu-rifoj estas kompare granda en la plej suda ekstremo de Ĉinio. Ili ĉiuj formiĝis el amasigitaj koraloj kaj kune ricevis la komunan nomon Insularo de Suda Ĉina Maro. Tie malklare vidiĝas insuletoj surmare kaj ĉarma pejzaĝo de tropika maro.


La maroj ĉe la orienta rando de la ĉina ĉeŝtero plejparte kliniĝas milde de nordokcidente sudorienten. Bohaj-marano estas profunda je ĉ. 20 m., la Flava Maro je ĉ. 40 m. kaj la Orienta Ĉina Maro je centoj da metroj. La ebena kaj malprofunda marareo taŭgas por kreskado de multaj vivuloj. Tial la fiŝejo de Ĉinio estas vastega. Ĝi kovras ĉ. 1 500 000 kvadratajn kilometrojn, kiuj konsistigas kvaronon de la malprofund-mara fiŝejo de la mondo. Inter ili Ĝouŝan-insulara marareo oriente de Ĝeĝjang-provinco estas nomata trezorejo de maraj fiŝoj. En fiŝada sezono oni povas kapti kelkcent mil tunojn da marproduktaĵoj. La ĉinaj maroj abundas je fiŝoj. Tie vivas pli ol 1 500 specoj da fiŝoj, inkluzive 200 specojn de ekonomiaj fiŝoj, el kiuj la grandaj kaj malgrandaj

Oleputo en la Orienta Ĉina Maro elŝprucigas ole-gason.





Fiŝkaptado sur maro



Marbanejo ĉe Gulangju en Ŝjamen

ŝtonkapaj fiŝoj, rubandaj fiŝoj kaj sepioj estas kvar ĉefaj marproduktaĵoj de Ĉinio. Krome, ankaŭ la salikokoj kaj holoturioj de Bohaj-marĉo kaj la Flava Maro, la pektenoj kaj grandaj meduzoj de la Orienta Ĉina Maro kaj la ostroj kaj meleagrenoj de la Suda Ĉina Maro estas famaj marproduktaĵoj de Ĉinio.

Ĉinio havas vastan marbordan malprofundaĵon kun areo de ĉ. 700 000 da hektaroj kaj multajn senondajn malprofundajn golfojn taŭgajn por kreskigi akvajn animalojn kaj plantojn, ekz. laminario, porfiro (*Porphyr*), salikoko, mitulo, ostro, meleagreno. Ili povas liveri abundajn manĝaĵojn, medikamentojn, brutan nutraĵon, sterkon kaj industriajn materialojn, kaj oni eĉ po-

vas ekstrakti el ili iujn valorajn metalojn.

Ankaŭ bestoj estas gravaj maraj riĉaĵoj. En la ĉinaj maroj vivas balenoj, delfenoj, fokoj, ĥelonioj k.a.

La maroj estas abundaj ankaŭ je mineraloj. Ĉe marbordo de Ĉinio oni jam trovis titanajn kaj zirkonajn ercojn en granda kvanto. Ili kiel raraj metaloj havas grandan industriajn valoron kaj estas ekspluatataj. Nun la marfunda nafto estas multe atentata. La marfundo de la Orienta Ĉina Maro havas sedimenton dikan je pli ol 2 000 m. kaj estas unu el la regionoj de la mondo kun grandega rezervokvanto de nafto. Nun oni faras petrolan prospektadon ĉe Kantono-golfo kaj Hajnan-insulo

en la Suda Ĉina Maro kaj trovis petrolan kaj gasan kampon kun granda rezervokvanto ĉe Jinggehaj-marĉo apud Hajnan-insulo. En profunda maro oni trovis ankaŭ manganan blokon kun multaj elementoj entenantan almenaŭ pli ol 30 specojn da utilaj metaloj kun granda ekonomia valoro.

La mara tajdo entenas grandan energion. Oni povas produkti elektron, utiligante ĝin. Sole la Flava Maro entenas tajdan energion de 55 milionoj da kilovattoj. Nun estas konstruitaj malgrandaj tajdaj elektrejoj en nemalmultaj marbordoj de Ĉinio. Ankaŭ la oceana fluo entenas grandan energion, tial la perspektivo por akiri energion el maro estas tre brila. □

Medio kaj materialigo de forĵetaĵoj

Polucio jam fariĝis unu el la plej turmentaj publikaj malutiloj por ĉiuj landoj. Polucion kaŭzas multaj kialoj, inter kiuj troviĝas forĵetaĵoj.

Laŭ takso la mondo produktas ĉiujare 7-10 miliardojn da tunoj da forĵetaĵoj. Ĉiujare Usono sola estigas 2.7 miliardojn da tunoj da industriaj forĵetaĵoj. Tiuj forĵetaĵoj kaj la hejmaj balaĵoj ĉiujare englutas ĉ. 10 000 kvadratajn kilometrojn. Japanio ĉiujare donas 30 milionojn da tunoj da hejmaj balaĵoj kaj 300 milionojn da tunoj da industriaj forĵetaĵoj. Kalkuto de Hindio ĉiujare forĵetas 750 000 tunojn da forĵetaĵoj. La urboj de Ĉinio ĉiujare produktas 50 milionojn da tunoj da forĵetaĵoj, kaj plie la kvanto de la forĵetaĵoj kreskas ĉiujare je 10%.

La kresko de ilia kvanto ne nur okupas vastan teron, sed ankaŭ serioze polucias la teron, akvon kaj aeron pro la longtempa restado sen traktado aŭ nekonvena traktado. Por solvi tiun problemon, naskiĝis tute nova medio-scienca: materialigo de solidaj forĵetaĵoj kaj batalo kontraŭ polucio. En la pasintaj jaroj multaj landoj donis grandegan sumon da mono kaj por moderigi polucion kaŭzitan de forĵetaĵoj kaj por plimultigi enspezon je centoj da miliardoj da usonaj dolaroj. En la pasintaj dekelkaj jaroj la industrie evoluintaj landoj donis grandan atenton al tio kaj iuj el ili prenis kiel fundamentan principon la

materialigon de solidaj forĵetaĵoj. Japanio multe klopodis en traktado de forĵetaĵoj kaj rimarkinde sukcesis en tio. En 1973, 16% de la forĵetaĵoj en Japanio estis materialigitaj, en 1976 la elcentoj altiĝis al 41%, kaj en 1979 al 55%.

Por trakti forĵetaĵojn, Japanio ĉiujare elspezas dek miliardojn da enoj. La 23 distriktoj de Tokio posedas 13 balaajn servojn. En Tokio pli ol 6 000 homoj profesie kolektas forĵetitajn paperojn, kaj 78% de tiaj paperoj estas reutiligitaj. Ĉiujare en Japanio oni forĵetas pli ol 3 milionojn da tunoj da eluzitaj plastaj ludiloj kaj elektronikaj pecoj. Per avangarda tekniko japanaj sciencistoj turnis forĵetitajn plastajojn en petrolon, kiun kamionoj kaj motorcikloj uzas kiel brulaĵon. Proksimume 50% de la forĵetitaj plastajoj, vitraĵoj kaj ceramikaĵoj estas reutiligitaj. La japanoj akiras el la forĵetaĵoj ankaŭ hidrargon kaj aliajn metalojn.

En Usono ĉiujare pli ol 500 milionoj da tunoj da forĵetaĵoj estas traktataj por reutiligo, kaj la spezo por tio atingas 18 miliardojn da dolaroj. En Usono estas tri grandaj kompanioj de forĵetaĵoj, tutlandaj trustoj, kiuj prizorgas 15% de la forĵetaĵoj de la lando, kaj ilia totala spezo superis 2 miliardojn da dolaroj. En Ĉikago estas translanda korporacio de forĵetaĵoj, la unua en la mondo. Ĝi havas 140 filiojn en la lando kaj ĉiujare la neta pro-

fito atingas 37 milionojn da dolaroj.

En Moskvo estas tri grandaj traktejoj de forĵetaĵoj. Unu el ili faras kemisterkon el forĵetaĵoj. En Leningrado estas aŭtomata traktejo de forĵetaĵoj, kiu distingas la feraĵojn el la forĵetaĵoj per magnete apartiga maŝino, premas la elprenitajn feraĵojn en blokojn kaj portas ilin en metalurgian fabrikon. Tiel kreiĝas ĉiujare 4 000 tunoj da fero. La forĵetaĵoj post elpreno de feraĵoj estas malkomponitaj kaj sterilizitaj en biotermotrakta ujo. Poste ili fariĝas miksaĵo, kaj el ĝi oni prenas sedimentojn kaj metas ilin en specialan aparaton por malkomponi ilin en bitumon, bruligeblan gason kaj surogaton de grafito. El la plej lasta restaĵo oni faras sterkon.

Ĉampano de Francio ĝuas la mondan renomon, tamen samtempe kun tio kreiĝis montoj da malplenaj boteloj. En la lando oni instalas 20 000 akceptujojn por malplenaj boteloj. En 1982, en antaŭurbo de Parizo oni konstruis boteloklasifikan fabrikon, la plej grandan en la mondo, kiu akiras ĉiujare 20 milionojn da boteloj.

En februaro 1972 Nederlando konstruis sintezan traktejon de forĵetaĵoj, la plej grandan en Eŭropo, kiu ĉiujare traktas 900 000 tunojn da forĵetaĵoj. Krom ordinaraĵoj forĵetaĵoj, la traktejo traktas ankaŭ kemiajn forĵetaĵojn. Ĝi produktas ĉiujare 9 milionojn da tunoj da dis-

tilita akvo per la varmo de bruligitaj forĵetaĵoj. Kaj krome la varmo estas utiligata ankaŭ en elektro-produktado kaj la cindro servas kiel voj-pavimilo.

Proksime de Stokholmo de Svedio oni konstruis aere-tranŝigan sistemon de forĵetaĵoj, la unuan en la mondo. En norda Svedio estas elektro-centralo kun kapacito de 25 milionoj da kilovattoj. Dekono de la brulaĵo bezonata de la elektro-centralo estas karbo kaj la cetera estas urbaj forĵetaĵoj, arboŝelo, segaĵo kaj rabotaĵo. Ĉiujare la elektro-centralo forkonsumas 200 000 kubmetrojn da urbaj forĵetaĵoj.

En Ĉinio antaŭlonge oni komencis fari konstruajn materialojn el industria skorio kaj kompoŝton el la ĉiutagaj forĵetaĵoj kaj fekaĵo. Ĉiujare pli ol

cent milionoj da tunoj da industria skorio estas utiligataj, 65% por la industrio de konstrua materialo. La ŝparita energio de pormura materialo egalas al 4 milionoj da tunoj da norma karbo. Dank' al reutiligo de forĵetaĵoj oni ŝparas ĉiujare pli ol 1 300 hektarojn da terspaco destinita por tenado de forĵetaĵoj kaj fabrikado de brikoj. Cetere oni akiras de forĵetaĵoj pli ol 20 milionojn da tunoj da cemento. En la pasintaj 20 jaroj Ĉinio reutiligis forĵetaĵojn kun valoro de pli ol dek miliardoj da jŭanoj (ĉ. 3.7 jŭanoj egalas al unu usona dolaro), ĉiujare akirante meze 200 milionojn da jŭanoj da profito. En la urbo Ĉangĝi de Ŝanŝji-provinco, Ĉinio, oni instalas dekelkajn malgrandajn traktojn por sinteze reutiligi urbajn forĵetaĵojn. En 1986 la urbo


akiris pli ol 30 milionojn da jŭanoj da profito dank' al la traktado. Iu agronomia instituto en Pekino provis tri jarojn kaj multe sukcesis en turno de fekaĵo kaj forĵetaĵoj en alt-efikan sterkon. La metodo estas tre efika por la traktado de urbaj forĵetaĵoj.

Multaj landoj faris grandan penadon en materialigo de forĵetaĵoj, tamen ankoraŭ konsiderinde maltrankviligas la problemojn koncerne la vivmedion de la homaro. Kaj plie, kune kun la evoluo de la industriigo kaj modernigo de la mondo, pli kaj pli kreskas la kvanto de forĵetaĵoj kaj pli kaj pli kompleksigas iliaj elementoj. Jen ni alfrontas neignoreblan problemon kiel racie kaj science trakti la forĵetaĵojn kaj turni ilin en "trezoron". □

Klasifikado de malnovaj vinboteloj



Prilaborado de eluzita pneŭmatiko en diskojn por fiŝistoj



En arbara zono ĉe la supra Jangzi-rivero

de GE ŜI

Ankoraŭ ne enirinte la Deĉenan Tibetanan Aŭtonoman Subprovincon de Junnan, ni jam vidis, ke veturas antaŭ ni unu post alia kamionoj plene ŝarĝitaj per ligno. La dikaj traboj sur ili montris, ke tie etendiĝas grandaj arbaraj zonoj.

ARBAROJ SUR MONTOJ KAJ EN VALOJ

La Arbara Zono de Nordokcidenta Junnan en Deĉen estas parto de la Arbara Zono de Sudokcidenta Ĉinio, la dua granda en la lando. En ĝi kaj la Arbara Zono de Okcidenta Siĉŭan kreskas la ĉefaj akvo-konservaj arbaroj sur montoj kaj en

valoj en la supra baseno de Jangzi-rivero.

Plejparto de Deĉen altas je 3 000 metroj super la marnivelo. Ju pli profundas la riverujo, des pli granda estas la distanco inter valo kaj montsupro. La komplikeco de geomorfologio, drasta ŝanĝiĝo de topografio kaj variado de klimato kreskigas la montaran flaŭron de mez- kaj malvarma zonoj en la subtropika zono kaj vidigas malsamajn vertikalajn zonojn de bioklimato. En la loko 2 400-3 600 metrojn super la marnivelo etendiĝas ĉefe pinglarbaroj de subalta monto, el kiuj la plej multaj estas picearo kaj abiaro. Ili kon-


sistigas 69.9% de la totala rezervo-kvanto. Sur la malaltaj montoj 1 600-2 800 metrojn super la marnivelo prosperas juglandarboj, kaŝtandarboj, zantoksiloj (*Zanthoxylum bungeanum*), uruŝioj kaj aliaj ekonomiaj arboj.

El la Garze-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco de Siĉŭan la rivero Ĝinŝa trafluas Deĉen, ĉirkaŭante ĝian ĉefurbon Ĝongdjan en okcidento, sudo kaj oriento. Ambaŭflanke de la rivero videblas fekundaj ebenaj kampoj, dissemataj vilaĝoj kaj tendoj, kontinuaj montĉenoj kaj densaj arbaroj. En Deĉen loĝas tibetanoj, kiuj konsistigas 33% de ĝia totala loĝantaro, kaj krome ankaŭ lisu-oj, han-oj, naŝi-oj, baj-oj, ji-oj kaj membroj de aliaj ok naciecoj. Ili sin okupas ĉefe pri arbarkulturo kaj brutobredado.

Deĉen havas 869 000 hektarojn da arbaroj. La procentaĵo de ĝia arbar-kovra areo estas 36% kaj ĝia rezervo-kvanto de ligno — pli ol 159 milionoj da kubmetroj. La procentaĵo multe superis la mezan arbar-kovran procentaĵon (17.7%) de la Arbara Zono de Sudokcidenta Ĉinio kaj tiun (12%) de la lando.

EN LA NATURPARKO BITAHAJ

Ni eniris la naturparkon Bitahaj 22 kilometrojn for de Ĝong-



djan, starigitan por protekti altmontajn malhelajn pinglarbojn kaj naturajn pejzaĝojn de altmontaj lagoj. Apenaŭ enirinte arbaron, ni flaris freŝan aeron kun odoro de humo kaj sentis malvarmeton. En la arbaro svarmas altaj arboj, kvazaŭ konkure kaptante spacon por vivi. Rojo trafluas valon kaj alportas vigecon al la silenta montarbaro. De tempo al tempo aŭdeblas kriado de fazano kaj rompobruo de arbobranĉoj. Juna laboranto Sun de la loka forstadministracio, kiu akompanis nin, rakontis, ke tie vivas multaj raraj bestoj kaj birdoj. Oktobre nigrakolaj grupoj alflugas tien el Ĉinghaj por travintri kaj la sekvantan aprilon reflugas al Ĉinghaj. Tie aktivadas ankaŭ nuboleopardoj (*Neofelis nebulosa*), linkoj kaj nigraj ursoj.

Ĉirkaŭe de Bitahaj staras montoj kovritaj de arbaroj. La arboj de malsamaj specioj sur la montdeklivoj formas malsamajn flaŭrojn, kiuj aspektas kiel bela olepenetraĵo sur la fono de la blua ĉielo kaj en la vasta akvaro. Nia akompananto montris la arbarojn: "90% de la arboj de nia Ĝongdjan-a Arbara Zono estas tro maturaj. Ĉiujare 1% el ili nature velkas kaj multe da ligno tiel perdiĝas."

Urbeto en arbara zono



En arbara zono

EKSPLUATO DE ARBAROJ


Ni informiĝis, ke komence de la 50-aj jaroj la ŝtato jam ekspluatis la Arbaran Zonon de Sudokcidenta Ĉinio kaj starigis dekojn da arbarkulturaj establoj, kiuj produktis sume pli ol centmilionon da kubmetroj da bonkvalita ligno kaj per tio forte subtenis la ekonomian konstruadon de la lando.

Deĉen havas kvin arbar-industriajn entreprenojn, kiuj ĉiujare povas produkti ĉ. milionon da kubmetroj da bonkvalita ligno.


Respondeculo de la Forst-administracio de Deĉen diris al ni, ke la subprovinco situas en fora limregiono kaj ne prosperas ĝia ligno-prilaborado, tial ĝi liveras ĉefe lignon, ke ĝia ekonomia efiko estas malalta, ĝia produkto-povo atingas nur ĉ. 20% kaj la arbaraj branĉoj kaj folioj restas neuzitaj. Por ŝanĝi tian situacion la subprovinco sin preparas por kompletigi instalaĵojn por simpla kaj delikata prilaborado de ligno kaj elfarado de platoj kaj traboj kaj planas fondi paperfabrikon kun jara produkto-kvanto de 50 000 tunoj da papero, kiu povos multe levi ekonomian efikon, ĉar unu kubmetro da ligno kostas nur ĉ. 250 jüanojn, kaj unu tuno da papero ĉ. 1 600 jüanojn.

La Ĝongdjan-a Forst-administracio de Junnan-provinco penas servi arbarojn al kemi-industrio kaj eksperimentas por fari abioleon, superan parfumon, el abiaj branĉoj.


Ni vizitis la provfarejon de abioleo, starigitan de la Ĝong-




Festotago de arbaraj loĝantoj



Neĝaj montoj




Tjanči-lago sur Aba-monto






La Blanka Kaskado



Vasta arbaro en montaro

*Gajaj tibetaj infanoj
en arbara regiono*





La Rezervejo Bitahaj

djan-a Forst-administracio en la forstokultivejo Bigu. La forst-administracio kaj la Akademio de Forsto-kulturaj Sciencoj de Junnan-provinco kunlaboras por la provfarado. Respondeculo pri la provfarado diris al ni, ke abi-oleo multe kostas en la internacia merkato, kaj ĝin produktas neniu ĉina entrepreno kaj tre malmultaj landoj. En 1983 la ĉinoj komencis esplori la aferon, kaj nun ankoraŭ faras eksperimentojn. Se ili regule produktos tian oleon, abundo da lokaj abiaj branĉoj alportos grandan ekonomian valoron.

Mi malŝtopis boteleton kun abi-oleo provfarita de ili kaj ekflaris fortan odoron de rezino. Laŭdire, tualetakvo kaj tualetsaĵo faritaj el ĝi ne nur agrable odoras, sed eĉ sterilizas kaj protektas la haŭton.

ARBARO BEZONATA POR KONSERVI AKVON DE JANGZI-RIVERO

Arbaro estas valora riĉfonto de la homaro. Ĝia valoro en protektado de la homa vivmedio multe superas ĝian valoron de la arbaraj kaj aliaj produktaĵoj liveritaj de ĝi.

Ĉar la Arbara Zono de Nord-okcidenta Junnan en Deĉen kaj la Arbara Zono de Okcidenta Siĉuan sin trovas en la supra baseno de Jangzi-rivero, tial ili ludas gravan rolon en konservado de ĝiaj akvo kaj grundo kaj en reguligo de klimato.

Ni petis de la respondeculo de la forst-administracio informon pri la protektado de arbaro kaj reforestumado en la malnova arbohakejo. Li diris al ni, ke laŭ difino de la supera forst-administracio arbojn hakas 100 homoj, dum plantas arbidojn 90 homoj proporcie. Sed pro diversaj kaŭzoj tio ĝenerale ne efekti-



La arbara zono Ĝongdjan

viĝis en la arbaraj zonoj de la lando. Laŭ enketo en Deĉen, la areo de la reforestumado estas nur duone kiom tiu de arbohakado. Kaj plie, jam konsumiĝis la hakitaj kaj ankoraŭ ne maturiĝis la plantitaj.

Ni veturis speciale al malnova arbohakejo por observi novan forston. Tie ni vidis la montojn kalvaj kaj arborompitaĵojn kaj arbostumpojn malorde kuŝantaj tie kaj tie. La arbidoj, plantitaj antaŭ 6-7 jaroj, restas ankoraŭ junaj kaj malfortaj, kontraste kun la apudaj dikaj arbostumpoj.

La respondeculo diris, ke por reforestumado oni ne havas sufiĉe da mono, nek posedas perfektan teknikon en kultivado de arbidoj, tial oni ĝenerale turnis lokon, kie oni dehakis la arbojn, en tiun por paŝtado kaj terkulturo. Tio ne nur malbonigis la

kvaliton de la arbara grundo, sed ankaŭ kaŭzis grandan forfluron de la tersurfaca pluvakvo kaj seriozan grundan erozion.

Liaj vortoj rememorigis nin pri raportaĵo publikigita antaŭ nelonge en ĵurnalo. Antaŭe en Siĉuan-provinco situanta same kiel Deĉen en la supra baseno de Jangzi-rivero oni malaperigis arbarojn por konstrui grenkampojn, tiel ke la procentaĵo de la arbar-kovra areo de la provinco malleviĝis de 20% en la komenco de la 50-aj jaroj al 11% kaj eĉ malpli ol 1% en iuj gubernioj, kaj la areo de grunda erozio kreskis de 94 600 kvadrataj kilometroj en la komenco de la 50-aj jaroj al 360 800, t.e. 68% de la totala areo de la provinco. La totala kvanto de ĉiujare perditaj nitrogeno, fosforo kaj kalio egalas al 350 000 tunoj da kemisterko.

La aktuala profunda leciono komprenigis la gravecon pri la protekto de la arbaraj riĉfontoj kaj ekologia ekvilibro. La respondeculo diris al ni, ke la Ministerio de Forsto de Ĉinio jam ellaboris gravan politikon por plifortigi forstumadon, limigi arbohakadon, rapidigi la restari-

ĝon de la arbaraj zonoj, kie oni troe hakis arbojn, kaj plibonigi la ekologian medion de la supra kaj meza basenoj de Jangzi-rivero, decidis redukti la arbohakan kvanton je naŭ milionoj da kubmetroj en la periodo de la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990) kaj ordonis plenumi gran-

diozajn verdigajn projektojn, inkluzive tiun de terkonservado en la supra kaj meza basenoj de Jangzi-rivero. Ankaŭ Deĉen alprenis la metodon de kuna arbarizado far la ŝtato, kolektivo kaj individuo kaj mobilizis ĉiujn fortojn por bone konstrui siajn arbarajn zonojn. □

POR KOMENCANTOJ

SOVAĜANSERO KAJ RANO

Aŭdinte ke sovaĝansero estas ĉioscia, la rano, kiu vivas en putro, dubas pri tio kaj intencas kapti ŝancon por lin ekzameni.

Iun tagon, kiam la sovaĝansero preterflugas, la rano plengorĝe krias: “Bonvolu halti, sinjoro sovaĝansero. Mi volas demandi vin: Ĉu vi scias kiom da herboj kreskas sur mia putomuro? Kian altecon ili havas?”

“Mia scio estas kiel guto en maro. Kvankam mi vizitis multajn instruistojn kaj amikojn,

tamen multajn aferojn mi ankoraŭ ne scias. Mi nepre petos vian instruon, se estos necese esplori tiajn herbojn.” La ĝentila respondo de la sovaĝansero kortuŝis multajn kolegojn sur la tero.

La rano pretendas, ke li jam venkis la sovaĝanseron, kaj postulas ke ĉiuj aliaj ne plu nomu lin “Rano en Putro” (mallarĝvidulo), sed ili ne konsentas kaj unuvoĉe elektas la sovaĝanseron kiel “multescian birdon”.



PARENCIĜO KUN POTENCULO

Vulpo volas parenĉiĝi kun potenculo. Li petas opinion de kapro. La kapro diras: “Bonvolu parenĉiĝi kun tigro!”

La vulpo respondas: “Mi iam parenĉiĝis kun la tigro, kiam li estis la reĝo de la monto. Sed poste li malsaniĝis kaj leono venis. Mi malkaŝis al la lasta lian fifaron ŝtele ĉasi bovon. De tiam li turnas la dorson al mi.”

La kapro proponas: “Do, parenĉiĝu kun la leono!” La vulpo klarigas: “Mi diris al la leono multajn belajn vortojn kaj verkis panegiron (laŭdan artikolon) por lia bukloro. Finfine ni

parenĉiĝis. Sed nun venis elefanto!”

La kapro demandas: “Kial vi ne parenĉiĝu kun la elefanto? Li ja estas pli forta.”

La vulpo respondas: “Mi jam vizitis la elefanton kaj diris al li: ‘Kia fiulo estas la leono! La bukloro ja montras lian kruelecon! Kiel li povas sin kompari kun vi? Via longa rostro estas simbolo de talento! Ni ĉiuj tre respektas vin!’ ”

La kapro demandas: “Ĉu la elefanto ne parenĉiĝis kun vi?”

La vulpo respondas: “Ne. La elefanto diris: ‘Antaŭe vi verkis panegiron por la bukloro de

la leono, sed nun vi asertas ke la bukloro estas signo de krueleco. Vi diras ke mia rostro estas simbolo de talento, sed mi timas, ke en iu tago mia rostro fariĝus marko de malsaĝo. For, for de mi!’ ”

La kapro longe meditas.

La vulpo diras: “Fraĉjo kapro, ni parenĉiĝu, ĉu bone? Via bela barbo plene montras vian bonkorecon kaj honestecon.”

La kapro respondas: “Dancon pro via afableco! Mi timas, ke vi iam mordos min de-dorse. Nu, ĝis revido!”

ĈINIO EMISIIS NOVAJN RENMINBI-BANKBILETOJN

En la 27-a de aprilo 1987 la Ĉina Popola Banko komencis emisii novan kompletan de Renminbi-bankbiletoj. La ĉefaj bankbiletoj estas tiuj de 1, 2, 5, 10, 50 kaj 100 jüanoj (Yuan), kaj la akcesoraj estas tiuj de 1, 2 kaj 5 ĝjaŭ-oj (Jiao). La cirkulantaj bankbiletoj kaj moneroj de 1, 2 kaj 5 fenoj (Fen) estas daŭre validaj (1 jüano = 10 ĝjaŭoj aŭ 100 fenoj). La novaj bankbiletoj estas samvaloraj kiel la malnovaj. La novaj kaj malnovaj bankbiletoj estas samtempe cirkulantaj kaj havas saman valoron kaj funkcion de cirkulo, pago kaj depono.

TRABORITA LA TUNELO DAJAŬŜAN

Post 8 jaroj, en la 6-a de majo, oni traboris la tunelon Dajaŭŝan sur la elektrizita dutraka fervojo inter Hengjang de Hunan-provinco kaj Kantono de Gŭangdong-provinco. La 14.295-kilometra tunelo ĉe la limo inter la provincoj Hunan kaj Gŭangdong trairas la montregionon Dajaŭŝan ĉe la suda fino de Nanling-montaro. Ĝi estas la plej longa tunelo en Ĉinio kaj unu el la dek plej longaj tune-
loj de la mondo.

Dajaŭŝan-tunelo



HEJMAJ ELEKTRAJ OBJEKTOJ EN RAPIDA DISVOLVIĜO

Laŭ statistiko de malpez-industria administracio, en 1986 Ĉinio produktis 9 milionojn da lavmaŝinoj, 33 milionojn da elektraj ventumiloj kaj 2.85 milionojn da fri-dujoj. La produktokvantoj staras en la unuaj vicoj de la mondo. Kaj la produktokvanto de elektraj marmitoj kaj gladiloj okupis la duan lokon en la mondo. La industrio de hejmaj elektraj objektoj rapide disvolviĝis post 1980 kaj ĝis nun la nombro de specoj de hejmaj elektraj objektoj kreskis de malpli ol 30 ĝis 100.

BALDAŬ FUNKCIOS LA PLEJ GRANDA HIDROELEKTREJO SUR LA FLAVA RIVERO

Longjangŝja, la plej granda hidroelektrejo sur la Flava Rivero, antaŭ nelonge komencis ellasi akvon. La generatoroj estas muntataj kaj la unua generatoro liveros elektron en septembro.

VIGLA KUNLABORO DE ĈINIO KUN EKSTERLANDO

Statistiko de koncerna departemento diras, ke ĝis la fino de 1986, 67 ĉinaj kompanioj de internacia ekonomia kaj teknika kunlaboro subskribis pli ol 3 600

kontraktojn kun ĉirkaŭ 90 landoj kaj regionoj. La monsumoj de tiuj kontraktoj atingis 6.37 miliardojn da usonaj dolaroj, el kiuj 3.3 miliardoj estis plenumitaj.

REFORMITA SPECIO DE GINSENGO

La novaĵ-proklama kunveno de la Ŝtata Scienca Komisiono de Ĉinio anoncis, ke ruĝa ginsengo de Ŝinkajhe kulturita en Ĝjian-gubernio de Ĝjilin-provinco de Ĉinio enviciĝis inter la avangardaj scienc-teknikaj fruktoj de la mondo.

La gubernio en Ĉangbaj-montaro havas longan historion de kulturado de ginsengo. La Ginsenga kaj Cervokorna Kompanio kaj koncernaj scienc-esploraj institucioj kune studis kaj reformis la plantadon, kulturadon, flegadon kaj prilaboradon de ginsengo kaj formis kompletan da apartaj kaj sciencaj metodoj. Pli ol 20 fakuloj ekspertizis kaj opiniis, ke tiu specio de ruĝa ginsengo de Ŝinkajhe havas belan formon, longan rizomon, altan produktokvanton kaj solidan kvaliton, kaj post prilaborado ĝi havas malmultan flavan ŝelon, ne krevas, ne malpleniĝas en la interno, ricevas brun-ruĝan koloron kaj diafanan gelatenon. Ĝiaj aspekto, fizika funkcio kaj interna kvalito superis tiujn de la japana ruĝa ginsengo kaj korea ginsengo.

LA ĈINGHAJ-TIBETA ALTEBENAĜO ABUNDA JE SPECIOJ DE ANIMALOJ

Post dekfoja vasta enketado ĉinaj scienc-esplorantoj anoncis, ke la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĝo estas tre riĉa je specioj de animaloj, inter kiuj troviĝas 200 specioj de bestoj, pli ol 500 specioj de birdoj, pli ol 100 specioj de fiŝoj, pli ol 80 specioj de amfibioj kaj

rampuloj kaj 170 specioj de insektoj.

150 SPECIOJ DE MINERALOJ TROVITAJ EN ĈINIO

Ĉinio jam trovis 150 speciojn de mineraloj. La rezervokvantoj de 137 el ili kaj tiuj de pli ol 15 000 minoj estis konstatitaj. Granda parto de la specoj povas kontentigi la bezonon de la mineraloj en la konstruado antaŭ 1990 aŭ en la posta pli longa tempo.

En la Sanhaja Fabriko de Elektraĵoj Gladiloj



Ĉin-medicinisto Hŭang Hujĉing (la dua de dekstre) esploras kapkusenajn kun drogherbojn kontraŭ hipertensio.



SUKCESA REKUNIGO DE FINGRO ROMPITA ANTAŬ 59 HOROJ

Hospitalo en Lanĝou en nord-okcidenta Ĉinio sukcese rekunigis fingron rompitan antaŭ 59 horoj. Antaŭ nelonge tiu hospitalo sukcesis rekunigi manon rompitan antaŭ 54 horoj. La rekordo markis novan progreson kaj mondan avangardan nivelon de Ĉinio en apliko de mikrokirurgio al rekunigo de rompitaĵoj membroj.

VASTA SERVOKAMPO DE LA ĈINA MEDICINO

La ĉina medicino multe sukcesis en kuracado de oftaj kaj

komplikaj malsanoj, kio jam estas rekonita de la mondo. Nun en Ĉinio estas trovitaj pli ol 5 000 specoj de drogoj. Du trionoj de la homaro de la mondo akceptas kuracadon de la ĉina medicino (inkluzive akupunkturon, mokson kaj masaĝon).

INTELEKTIGITA DIAGNOZATORO

Novtipa intelektigita diagnozatoro por kor(encefal)-malsanoj kun komputilo, kolekta-trakta ekipaĵo por bioelektraĵoj informoj kaj aranĝaĵo por transmisio de desegnoj, la unua en la mondo, estis sukcese provfarita en Ĉinio. Ĝi havas la avantaĝon de simpla

manipulado, facila uzado, alta aŭtomateco, rapida mezurado kaj diagnozado kaj alta precizeco. Ordinara ekzameno de kor(encefal)-malsano per grupo da maŝinoj postulas 1-2 tagojn, dum la nova maŝino postulas nur 20 minutojn por akiri ĉiujn 400 donitaĵojn kaj la rezulton de la diagnozo.

SUBTERA KONSERVEJO EN LA IMPERIESTRAL PALACO DE PEKINO

Lastatempe oni komencis konstrui la unuan ĉinan subteran konservejon de historiaj objektoj en la Muzeo de la Imperiestralo en Pekino. La konservejo kun plank-areo de 4 818 kvadrataj metroj en tri etaĝoj ricevos ferbetonan framon. Oni faros al ĝi bazan traktadon per speciala teknologio por imunigi kontraŭ akvo kaj malsekeco. Ĉiuj elektraĵoj, klimatiziloj, kontraŭŝtelaj kaj kontraŭbrulaj ekipaĵoj estos aŭtomate regataj per komputilo.

RIMARKINDAJ ATINGOJ DE LA ĈINA VIRINA HALTERLEVO

En la Unua Ĉina Virina Halterleva Ĉampioneca Konkurso 29 sportistinoj 88-foje superis 16 plej bonajn mondajn atingojn en sep kategorioj. Sportistinoj Zeng Ŝinling de Hunan kaj Li Hongling de Ljaŭning altigis la plej bonan mondan atingon je 17.5 kg. respektive en la kategorioj de 60 kg.


(Daŭrigo sur p. 67)

STUMBLO

(Humurajo)

Kiam senĝena anoncistino sursceniĝis, ŝi preskaŭ falis pro rekvizito sur la planko. Ŝi stariĝis kaj diris aplombe al la publiko: "Mi stumblis pro via entuziasmo."

KIUJN CIFEROJN LA FRUKTOJ REPREZENTAS?



La frukto en la supra bildo signas la ciferojn 1-10. Bv. substitui la ciferojn al ili, ke ĉiuj aritmetikaj formuloj en la bildo estu defendeblaj.

(Solve trovebla en ĉi numero)

SERĈU LITEROJN

Oni aranĝas la 26 literojn en la sekvanta bildo laŭ regulo. Sed du el la literoj estas misaranĝitaj. Atente legu la ciferojn kaj eldiru, kiun regulon ili sekvas (nepre forlasu la legitajn li-

A	R	B	G	O	C	K	Q
Z							T
I							D
L							X
N							S
M							P
F	U	Y	V	W	J	E	H

terojn). Kaj serĉu la ciferojn misaranĝitajn.

(Solve trovebla en ĉi numero)

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

A: Kio estas same granda kiel elefanto, sed malpli peza ol papero?

B: Ombro de elefanto.

A: En kiu monato oni plej malmulte parolas?

B: En februaro. Ĉar ĝi nombras plej malmulte da tagoj.

A: Kiam la luno plej pezas?

B: Kiam ĝi estas plena.

A: Kiu en la mondo estas la plej forta?

B: Trafika policano. Per sola fingro li povas jam haltigi ĉiujn


aŭtojn grandajn kaj malgrandajn.

A: Kial la knabo iras kun ŝtuparo al lernejo?

B: Ĉar li volas viziti pli altan lernejon.

UNUSTREKA DESEGNO


(Distraĵo)



Desegnu la supran bildon per unu streko, sen interrompo kaj ripeto.

(Solve trovebla en ĉi numero)

Duringado (Karikaturo)
de ŬEJ PING



Dimanĉe

Laŭ statistiko, ĉiu pekinano havas meznombro 2.5 horojn da libera tempo ĉiutage — ĉiu viro 3.3 horojn kaj ĉiu virino 1.8 horojn. Tion kaŭzas malbona socia servo kaj longa mastrumado. Iuj virinoj faras ne nur 8-horan profesion laboron, sed ankaŭ 3.5-horan hejmlaboron ĉiutage, kaj estas tre okupitaj de mastrumado en dimanĉo.

“MI SENTAS MIN TRE LACA”

Ŝju Gŭoĝen, laboranta en la Ĉina Informa Centro de Aviadaj Scienco kaj Tekniko, jam atingis la aĝon de 40 jaroj. Ŝi havas feliĉan familion. Matene de iu dimanĉo mi vizitis ŝin, kiu jam komencis mastrumadon. Kun

emocio ŝi diris al mi: “Preskaŭ ĉiudimanĉe je duono post la sesa la horloĝo vekas min el sonĝo. Mi tuj ellitiĝas, surmetas vestojn, duonportas ŝuojn kaj rekte iras al la kuirejo. Post duonhoro la matenmanĝo estas pretigita kaj metita sur la tablon. Miaj edzo kaj gefiloj ekmanĝas kun bona apetito.

“Post la matenmanĝo mia edzo ekfunkciigas la lavmaŝinon por lavi malpurajn vestojn uzitajn de la tuta familio en semajno; kaj tre rapide mi ordigas kaj purigas la ĉambrojn. Poste mi iras al manĝaĵvendejo, kie mi vicatendas por aĉeti viandon kaj kolbasojn. Mi iras ankaŭ al foiro por aĉeti marĉande freŝajn legomojn kaj poste revenas hej-

men por prepari abundan tagmanĝon.

“Mia filo lernas en supera mezlernejo kaj mia filino ĵus fariĝis mezlernejanino. Ŝi estas ludema. Mi ofte laborante klarigas al ŝi matematikajn problemojn aŭ kontrolas ŝian taskon plenumitan dum semajno.

“Posttagmeze mi aŭ flikas pantalonojn por la gefiloj, aŭ kudras novan veston por mi, aŭ trikas lanveston.


“Iafoje subite eksonas frapado al la pordo, venas nia kolego aŭ iama kunlernanto el alia provinco. Mi tuj ĉesigas mian mastrumadon por akcepti la gaston. Post la adiaŭo, jam estas nokto. Nur tiam mi povas iom legi, sed ofte la talio kaj dorso doloras min kaj mi oscedas de laciĝo. Mi ofte pensas: Krom dormado, mi ne havas eĉ unu horon por libere disponi, por legi aŭ amuziĝi.


“Mi esperas, ke mia familio estos feliĉa kaj mi fariĝos elstara oficistino, sed tia vivo ripetiĝas ĉiutage, ĉiujare, ke mi sentas min tre laca. . .”

SIGNIFOPLENA VIVO

Mi vizitis ankaŭ la 27-jaran Liŭ Gŭojing. Ŝi estas aktorino de la teatra trupo de la Ĉina Dramaturgia Instituto. Enirinte ŝian domon, mi trovis, ke ŝia ĉambro ne estas granda, sed pura, orda kaj elegante ornamita. Mi pririgardis la mastrinon en modaj vestoj kaj kun hararo mode aranĝita. Kvankam ŝi ripozis hejme, tamen ŝi bele tualetis. Evidente, ŝi estas talenta virino.

Liŭ Gŭojing kun siaj edzo kaj infano en parko





Sju Gŭoĝen en purigado

Videble, ŝin ne tudas aferoplena dimanĉo. Kiam mi demandis, kiel ŝi aranĝas la vivon en dimanĉo, ŝi diris: "Ordinare mi kaj mia edzo ĉiam bone ordigas la ĉambron. Ni ne prokrastas lavi malpurajn vestojn ĝis la sekva tago. Tial dimanĉe ni ne laboras multe, sed ĉefe ni nin amuzas aŭ preparas bongustajn manĝaĵojn." En dimanĉo la geedzoj promenas en parko kun la filo en ĉareto aŭ vizitas kinejon. La edzo estas societema kaj havas multajn amikojn. Dimanĉe ili ofte vizitas ilin. Tiam la mastro lerte preparas abundajn manĝaĵojn. Ili ĉiuj babilante ĝuas la manĝaĵojn ĉe la tablo. Vespere, ŝi sentas lacon, tamen plezuron, kaj opinias, ke la vivo estas signifoplena kaj poezia.

ŜARĜO DE MALJUNULOJ

Geedzoj ambaŭ laborantaj sen helpanto en la hejmo ĉiutage estas tre okupitaj de mateno ĝis vespero. Se ili havas helpan ton en la hejmo, la situacio estas alia. Ekzemple, en multaj familioj kun maljunuloj la mastro-

majoj estas preskaŭ tute farataj de la maljunuloj. En dimanĉo la maljunuloj ĝenerale prenas sur sin mem plejparton de la mastromado, por ke iliaj gefiloj bone ripozu.

Tiel faras la maljunaj geedzoj Ŝe Da. Ili vivas kune kun la plej juna filo, bofilino kaj aminda nepino. La filo kaj bofilino laboras fore de la hejmo. Ĉiuj mastrumaĵoj falis sur la maljunulojn, kiuj devas de tempo al tempo prilabori malgrandan ĝardenon apud la domo. La tuta familio gaje pasigas ĉiun semaj-

non pro ilia bona aranĝo de la vivo.

Dimanĉe la maljunuloj preskaŭ ne havas tempon flegi la florojn, ĉar iliaj gefiloj kaj gene-
poj ĉiuj venas por viziti ilin. La maljunuloj aĉetas legomojn kaj preparas manĝaĵojn. Poste la tuta familio sidas ĉe ronda tablo por ĝui la bongustaĵojn. Post la foriro de la vizitantoj la maljunuloj devas refoje purigi kaj ordigi la ĉambron. Kiam ili enlitiĝas, ili sentas doloreton en la talio kaj kruroj, tamen ili estas ĉiam ĝojaj. □



La geedzoj Ŝe Da flegas florojn.

(Daŭrigo de p. 64)

kaj 75 kg. La 14-jara kampara knabino Bi Cajĝjŭan superis la plej bonan mondan atingon je 20 kg. en la kategorio de 56 kg.

15 ORAJ MEDALOJ POR ĈINAJ EKSPONAĴOJ

En la 15-a Ekspozicio de Inventaĵoj en Zagrebo de Jugoslavio, 15 eksponaĵoj el Ĉinio estis premiitaj per ora medalo. La premiitaj ĉinaj eksponaĵoj koncernas medicinon, farmacion, kemian industrion k.a., ekzemple holografia


diagnozatoro, fluo-regata okulvitra tranĉilo kaj kemia sengluga teknologio por kanabo.

ĈINAJ ROBOJ ŜATATAJ DE JAPANAJ VIRINOJ

Antaŭ nelonge Ĉinio okazigis en Tokio ekspozicion de ĉinaj roboj, kiujn tre ŝatas japanaj virinoj, ĉar tia vesto estas eleganta, plej taŭga por vidigi la kurblinian belecon de orienta virino. Japaninoj konkure aĉetis la multekostajn robojn. La plej ŝatata estis el nigra veluro kun orfadena brodaĵo.

Masaĝo (I)

La vivo daŭras dank' al la cirkulado (sistema kaj pulma) de la arterioj kaj vejnoj. La cirkulo trairas la tutan korpon nur en pli ol 20 sekundoj. Iafaĵe influate de faktoroj eksteraj aŭ internaj,



la sango cirkulas iom malrapide, tiam aperas malsano. Por preventi kaj kuraci la malsanon oni povas akceli la cirkuladon per masaĝo.

MASAĜO DE LA VERTO

Teniĝo: Sidu aŭ staru senĝene.


Movoj: Forte premu per ambaŭ manplatoj kun la fingroj kunmetitaj la supran parton de la frunto (Vd. bildon 2), kun okuloj fermitaj kaj sen ia ajn distriĝo. Iom forte frotadu malantaŭen de la fruntaj harradikoj ĝis la malsupra nuko (Vd. bildon 3). Kalkulu en la kapo la fojojn de la frotado. Direktu la movojn nur malantaŭen kaj spiru nature.

Fojoj: 8, 12 aŭ 16.

Efiko: Refreŝigi la cerbon, normaligi la sangpremon kaj elimini internan varmon estigitan de la korpa malforteco.

MASAĜO DE LA TEMPIOJ

Movoj: Per la dikfingraj palpku-senetoj firme premu la tempiojn kaj metu la aliajn fingrojn sur la harojn



kaj movu forte la dikfingrojn de la tempioj tra malantaŭ la oreloj, ĝis sub la okcipitalo, kaj daŭrigu la frotadon malsupren ĝis la malsupra nuko (Vd. bildon 4). Movu ĉiam malsupren kun natura spirado.

Fojoj: 8 aŭ 16.

Efiko: Malmultigi la malutilajn vitalaĵojn, kvietigi kapdoloron kaj preventi malvarmumon.

MASAĜO DE LA TEMPIAJ HAROJ

Movoj: Premu per la manplatoj la tempiajn harojn, kun la dikaj fingroj levitaj kaj la aliaj metitaj sur la haroj. Forte frotu per la manplatoj la tempiajn harojn supren kaj malsupren (unu fojo konsistas el movoj direktitaj supren kaj malsupren) (Vd. bildon 5), kun natura spirado.

Efiko: Kuraci la doloron de triĝemela nervo kaj kapdoloron. □

(Daŭrigota)

Solve por "Kiujn ciferojn la fruktoj reprezentas?":


Ananaso=8 Piro=4 Eriobotrio=2 Liĉio=1 Banano=7 Granato=9 Persiko=6 Pomo=3 Vinbero=5 Akvomelono=10

Solve por "Serĉu literojn":

Legu la unuan literon A kaj transpasu unu kvadraton. Poste legu la duan literon B kaj transpasu du kvadratojn, pli poste legu la trian literon C. . . Tiamaniere legu ĝis la lasta litero Z. Oni devas interŝanĝi la lokojn de la 21-a litero V kaj la 22-a litero U.

Solve por "Unustreka desegno":

Desegnu laŭ sagpintoj.



Ĉinaj antikvaĵoj

de ĜJI SING

La brilan kulturon de 5 000 jaroj de la ĉina nacio atestas ankaŭ sennombraj antikvaĵoj elfositaj el sub la tero. La suba poŝtmarkoserio



el 12 pecoj emisiita en la 20-a de novembro 1973 montras:

Bludesigna plata kruĉo kun buŝo en formo de feniksa kapo de Ĵuan-dinastio (1271-1368);

Argenta kruĉo orumita kun figuro de ĉevalo kaj vinpokalo de Tang-dinastio (618-907);

Nigre glazurita ceramika ĉevalo de Tang-dinastio;

Terakota homo de Tang-dinastio;

Kolon-bazo kun ŝtonaj gravuraĵoj de la Norda Ŭej-dinastio (386-534);

Bronza ĉevalo galopanta de la Orienta Han-dinastio (25-220);

Orumita kaj inkrustita kupra skatolo por inkfrotujo de la Orienta Han-dinastio;

Lanterno uzita en Ĉangŝin-palaco de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-24 p.K.);

Bronza *ding-o* (tripieda ujo) kun kovrilo kun tenilo en anasa formo de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-475 a.K.);

Bronza vazo de la Okcidenta Ĝou-dinastio (1066-771 a.K.);

Bronza *jou-o* (vinujo) de Ŝang-dinastio (1711-1066 a.K.);

Fajenca *ding-o* kun ruĝa desegno de la posta periodo de la primitiva socio (antaŭ ĉ. 2 000 jaroj).

215



Peizaço de Tjanzi-monto en Hunan-provinco

Foto de **GANG JUNLEJ**